



EL POPOLA ĈINIO

人民中國新聞

11

1971



Batalanto de la Popolaj Trupoj por Publika Sekureco de la areo Vinh Linh de norda Vjetnamio gardostaras ĉe la ponto Hien Luong sur la plej antaŭa fronto de la patrolando.

Certe Venkos la Vjetnama Popolo

Milica mitrala grupo de iu vilaĝo de la provinco Ha Tinh, norda Vjetnamio, faris novan kontribuon al la kontraŭusona naciŝava milito, per faligo de tri usonaj banditaj aviadiloj.





Marŝas la heroaj komandantoj kaj batalantoj de la Vjetnama Popola Armeo alte tenante la gloran standardon de "firma decido batali kaj venki".

Milicanoj de Quang Trach de Quang Binh decidis ĝisfunde venki la usonajn agresantojn kaj ĉiujn iliajn lakeojn.





La Vjetnama Popola Armeo en milita trejnado

Artileriistoj de la Popola Armeo de norda Vjetnamio brave defendas insulon de la patrolando.





La Sudvjjetnama Liberiga Armeo faras en venko ofensivon kontraŭ usona-pupa trupo.

Mitrala plotono de iu trupo de la Sudvjjetnama Liberiga Armeo brave militas en norda parto de la provinco Quang Tri kaj akiris bonan sukceson.





Sur la altejo n-ro 500 ĉe la landlimo inter Vjetnamio kaj Laoso, la Sudvjetnama Liberiga Armeo komplete ekstermis la 39-an specialan batalionon de la saĝona pupa armeo. Jen batalantoj de la Liberiga Armeo nombras militajn kaptajojn.

Raŭpoira kanono de la usona-pupa armeo detruita de la Sudvjetnama Liberiga Armeo ĉe la 9-a ŝoseo.



Venko Certe

Apartenos al la Heroa

Vjetnama Popolo

LA 2-a de septembro de 1971 estis la brila festotago de la 26-a datreveno de la fondiĝo de la Vjetnama Demokratia Respubliko.

Kamarado Maŭ Zedong, prezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, kamarado Lin Biaŭ, vicprezidanto de la Centra Komitato de KPC kaj kamarado Ĝoŭ Enlaj, ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro de la Ĉina Popola Respubliko, sendis telegramon je la 1-a de septembro al kamarado Ton Duc Thang, prezidanto de la Vjetnama Demokratia Respubliko, kamarado Le Duan, la unua sekretario de la Centra Komitato de la Labora Partio de Vjetnamio, kamarado Truong Chinh, prezidanto de la Konstanta Komitato de la Nacia Asembleo de VDR kaj kamarado Pham Van Dong, ĉefministro de la registaro de VDR por plej varme gratuli ilin pro la 26-a datreveno de la fondiĝo de VDR.

La telegramo diras interalie: “La Vjetnama Demokratia Respubliko estas la unua socialisma lando fondita en la Sudorienta Azio post la Dua Mondmilito. En la pasintaj 26 jaroj, imperiismaj agresantoj senĉese lanĉis agresan militon kontraŭ ĝi. Sub la saĝa gvido de la granda gvidanto Prezidanto Ho Chi Minh kaj la Labora

Partio de Vjetnamio, la heroa Vjetnama popolo faris longan malcedeman batalon kaj akiris antaŭ ĉio la brilan venkon de la rezista milito kontraŭ la franca agreso. En la lastaj dekelkaj jaroj, kun sentima heroismo la vjetnama popolo rezistis kontraŭ la plej barbara agreso lanĉita de la usona imperiismo kaj akiris grandan venkon en la kontraŭusona naciŝava milito. Kaj batalante kaj produktante, la popolo de norda Vjetnamio akiris, kun forta persistemo kaj spirito de sinapogo sur la propraj fortoj, grandajn atingojn en la konstruado de socialisma ekonomio kaj nacidefendo. La grandaj venkoj de la vjetnama popolo forte subtenis la diverslandajn popolojn en revolucia batalo kontraŭ imperiismo kaj starigis brilan ekzemplon por la subpremataj nacioj kaj subpremataj popoloj de la tuta mondo batalantaj por libero.” La ĉina popolo sentas fieron havante la vjetnaman popolon kiel sian heroan kaj firman kunbatalanton.

Bonega estas la situacio de la kontraŭusona naciŝava milito de la tri popoloj de Hinduĉinio. Por savi sin el malvenko, la usona imperiismo vane klopodas fari kontraŭatakon en milito. Ĝi rifuzas proklami la daton por retiro de siaj agresaj trupoj el suda Vjetnamio, daŭre antaŭ-



Ngo Thuyen, ambasadoro de la Vjetnama Demokratia Respubliko al Ĉinio, okazigis solenan akceptan kunvenon por varme celebri la 26-an datrevenon de la proklamo de la sendependiĝo de sia lando.

enpuŝas sian intrigon de “vjetnamigo” de la milito kaj la “doktrino de Nixon” de batalo kontraŭ azianoj per azianoj. Unuflanke ĝi evitas respondi pri la sepunkta propono por paco de la Provizora Registaro de la Respubliko de Suda Vjetnamio kaj aliflanke disvastigas dirojn pri kunvoko de ĝeneva konferenco, kun la vana espero obstine restadi en suda Vjetnamio. Sed neniam sukcesos ĉiuj ĝiaj intrigoj. La heroo vjetnama popolo estas marŝanta en venko, kun firma decido efektivi la sanktan testamenton de Prezidanto Ho Chi Minh: “Tiel longe ĝis kiam unu sola agresanto restos sur nia tero, ni batalos plu por lin forpeli.”

La revolucia amikeco kaj batala unuiĝo inter la du partioj, du registaroj kaj du popoloj de Ĉinio kaj Vjetnamio estas persone elkulturitaj de la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ kaj la granda gvidanto de la vjetnama popolo Prezidanto Ho, kaj estas bazitaj sur la fundamento de Marksismo-Leninismo kaj proletara internaciismo kaj povas elteni ĉian ajn uraganon. La popoloj de Ĉinio kaj Vjetnamio ĉiam simpatias, helpas kaj subtenas unu la alian en la komuna batalo kontraŭ imperiismo. La granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ montris: “La sepcentmiliona ĉina popolo estas potenco apogilo por la vjetnama popolo, kaj la



vasta teritorio de Ĉinio estas fidinda postfronto de la vjetnama popolo.” Tutforte subteni la kontraŭusonon nacisavan militon de la vjetnama popolo kaj la aliaj popoloj de Hindaĉinio ĝis la plena venko estas la neŝancebla politiko de niaj partio kaj registaro kaj ankaŭ plenumenda internaciisma devo de nia popolo. La heroa vjetnama popolo batalos ĝis la fino kaj la ĉina popolo ĝin subtenos ĝis la fino. Ĉiam ajn kaj sub ĉia ajn cirkonstanco, la ĉina popolo ĉiam unuiĝos, batalos kaj venkos kune kun la frataj popoloj de Vjetnamio kaj la aliaj landoj de Hindaĉinio. Ni profunde konvinkiĝis, ke la fina venko certe apartenos al la heroaj popoloj de Vjetnamio kaj la aliaj landoj de Hindaĉinio.

Vjetnamaj Filmoj

Prezentataj

en Diversaj Lokoj

de Ĉinio

LA vjetnama rakonta filmo *Frateto Phuoc* kaj la novaĵ-filmo *Fortika Citadelo Vinh Linh* estis ekprezentitaj en Pekino kaj aliaj lokoj de Ĉinio je la 2-a de septembro.

La filmo *Frateto Phuoc* priskribas sudvjetnamajn knabojn brave kaj sagace batalantajn kontraŭ usonaj agresantoj en la nacisava milito.

La filmo *Fortika Citadelo Vinh Linh* vivece registras heroan faron de la armeo kaj popolo de Vinh Linh sur la fronto de norda Vjetnamio kompakte unuiĝintaj sub la korekta gvido de la Labora Partio de Vjetnamio por decideme kontraŭbatali kaj venki la usonajn agresantojn. La heroaj armeo kaj popolo de Vinh Linh konstruis per siaj propraj manoj fortikan subteran defendlinion. Ili persistas samtempe en produktado kaj batalado kaj montras la revolucion heroismon de la vjetnama popolo. Krome, la filmo forte malkaŝas la kondamnindajn krimojn de la usonaj agresantoj en Vjetnamio.

Ambaŭ filmoj estas faritaj respektive de la Hanoja Studio de Vjetnamio kaj Vjetnama Studio de Novaĵaj kaj Dokumentaj Filmoj kaj adaptitaj al la ĉina lingvo de la Studio “Unua de Aŭgusto” de la Ĉina Popola Liberiga Armeo.

Prospera Brutobredado de Ĉinio

POST la fondiĝo de la nova Ĉinio, nia brutobredado havis rimarkindan disvolviĝon. Nun, en la vastaj agrikulturaj kaj paŝtaj regionoj en la tuta Ĉinio ĉie oni povas vidi gregojn da grasaj brutoj. La rapida disvolviĝo de brutobredado liveris ne nur abundajn viandon kaj aliajn vivbezonojn al la nacioj de nia lando, sed ankaŭ grandan

*Porkobredejo de Hangiaĉuan-brigado
de Dongbejyang-komunumo de Pekino*




kvanton da organika sterko kaj ŝarĝbrutoj al la agrikultura produktado, kio akcelis la pliprodukton de agrikulturo.

Nia lando estas tre vasta kaj havas herbejojn de kelkaj miliardoj da muoj. En tiuj herbejoj la klimato estas tre konvena por paŝtado kaj en plejparto de Ĉinio la brutaroj tutjare havas paŝtejon. Utiligante tiun ĉi tre favoran kondiĉon, la vastaj amasoj de kamparanoj kaj paŝtistoj bredas diversspecajn brutojn kaj kortobirdojn. Ĉevaloj, azenoj kaj muloj estas bredataj ĉefe en agrikulturaj kaj paŝtaj regionoj de la norda Ĉinio, bubaloj dislokiĝas en sudaj rizoproduktantaj regionoj, poefagoj troviĝas en nordokcidentaj kaj sudokcidentaj altebenejoj, kameloj estas ŝarĝbrutoj en sekaj paŝtaj regionoj, ŝafoj kaj kaproj ĉefe estas en nordaj paŝtaj regionoj kaj duonagrikulturaj kaj duonpaŝtaj regionoj. Porkobredado en plejparto de la lokoj havis disvolviĝon. Bovo kaj kokoj, anasoj kaj aliaj kortobirdoj troviĝas tra la tuta lando.

Brutobredado de Ĉinio havas longan historion. Nia laboranta popolo de longe kutimas al bredado de brutoj kaj kortobirdoj kaj elkulturis elitajn speciojn el ili en longtempa praktikado. Sed pro la kruela ekspluato kaj prirabo de feŭdaj regantaj klasoj en ĉiuj dinastioj kaj kuomintang-aj reakciuloj, brutobredado trafis gravan detruon. Ĉe la Liberiĝo de nia lando en 1949, restis nur malmultaj dombestoj kaj kortobirdoj de bonaj specioj.

La naskiĝo de la nova Ĉinio ĝisfunde ŝanĝis la malprosperan staton de brutobredado. La granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ tre zorgas pri brutobredado kaj antaŭlonge jam faris instrukcion pri ĝia disvolvo. Post la Liberiĝo de la tuta lando, Prezidanto Maŭ ellaboris la principon “preni grenon kiel ĉefĉeneron kaj disvolvi ĉiujn aferojn” kaj faris serion da instrukcioj kiuj montris klaran direkton por la disvolvo de brutobredado. La Partio kaj ŝtato multfoje faris decidojn kaj ellaboris planojn por gvidi tiun laboron. La vastaj amasoj de kamparanoj kaj paŝtistoj de nia lando



Per kolektiva forto, oni solvis la problemon de trinka akvo de brutoj en paŝtregiono de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio.

montris gigantan socialisman aktivecon kiel en energia disvolvo de grena kaj kotona produkto, tiel ankaŭ en disvolvo de brutobredado. Nelonge post la Liberiĝo, la totala nombro de brutoj kaj kortobirdoj de nia lando rapide grandiĝis. Interalie la nombro de porkoj de 1954 plimultiĝis je 76% kompare kun tiu de 1949.

Poste, nia lando efektivigis iom post iom agrikulturan kooperadon kaj komunumigon, kio kreis pli favorajn kondiĉojn por disvolvo de brutobredado. En popolkomunumoj, la tero estas unuece administrata de la kolektivo, tial la disvolvo de bredado de brutoj kaj kortobirdoj, la uzo de tero kaj paŝtejoj fariĝis pli laŭplanaj kaj raciaj. La vastaj amasoj de komunumanoj estis mobilizitaj kaj partoprenis preventon kaj kuracoon de malsanoj de dombestoj, tiel ke multe maloftiĝis iliaj malsanoj. Nemalmultaj gubernioj kaj komunumoj kulturis veterinarojn por la produktaj brigadoj. Ili estas kaj bredistoj kaj veterinaroj. Krom tio, la ŝtato ĉiujare edukis por la gubernioj, komunumoj kaj brigadoj certan nombron da veterinaroj, por plifortigi la gvidon en brutobredado kaj preventan kaj kuracan laboron. En la trijara serioza natura katastrofo ekde 1960, sin apogante sur la kolektiva

forto de popola komunumo, la komunumanoj venkis la malfacilojn kaj nia lando akiris bonan rikolton en agrikulturo dum 9 sinsekvaj jaroj ĝis 1970 kaj ankaŭ relative grandan disvolvoo de brutobredado. La totala nombro de porkoj kaj ŝafoj de la tuta lando kvarobliĝis kompare kun tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo. Interalie, la nombro de ŝarĝbrutoj multe grandiĝis.

En disvolvo de brutobredado, la ŝtato donis kapitalon por fondi reproduktejojn de bonaj specioj kaj fari laŭplanan kulturon kaj reprodukon kaj krome profunde mobilizis la vastajn amasojn, por ke ili serioze resumu sperton en praktiko kaj kreu novajn sukcesojn. De multaj jaroj, dank' al zorgema kulturado de vastaj amasoj de kamparanoj, paŝtistoj kaj sciencaj laborantoj, la kvalito kaj nombro de iuj ekzistantaj bonaj specioj de brutoj havis plian altiĝon. Krome novaj bonaj specioj de brutoj estis elkulturitaj. Ekzemple, makulaj kaj nigraj porkoj de Pekino, Nejgiang-porkoj de Siĉuan, Ninghiang-porkoj de Hunan, Hingin-porkoj de Liaŭning k. a. kreskas tre rapide, facile adaptiĝas al krudaj nutraĵoj kaj malofte malsaniĝas. La fajnlanaj ŝafoj de Hingiang donas ne nur bongustan delikatan viandon, sed ankaŭ mul-



Kadroj kaj membroj de Vuŝenĝaŭ-komunumo de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio markas ŝafidojn por dividi ilin en gregojn por doni al ili apartan zorgon.

te da fajna lano por produkto de altklasaj ŝtofoj. La makulaj bovinoj elkulturitaj de la Pekina Bredejo de Laktobovinoj ĉiu donas ĉiujare ĉirkaŭ 5,000 kilogramojn da lakto, kaj iuj 8,000-9,000 kg, multe pli ol la nederlandaj bovinoj de tiu bredejo. Ŝou-guang-kokoj de Ŝandong, Pudong-kokoj de Ŝanhajo, Taŭjuan-kokoj de Hunan, Dagu-kokoj de Liaŭning k. a. specioj de kokoj kiuj liveras samtempe delikatan viandon kaj multajn ovojn, estas bonvenaj al la amasoj.

En brutobredado de nia lando, la bredo de porkoj estas aparte menciinda. Porko estas la plej grava el niaj dombestoj. Krom viando porko donas ankaŭ haregojn, ledon, ostojn, internaĵojn vaste uzablajn. Porkfekaĵo estas multe pli bona ol neorganika kemisterko. Nia lando praktikas la principon aktive disvolvi kolektivan porkobredadon kaj kuraĝigi tiun de komunumanoj. Multaj komunumoj, brigadoj kaj precipe produktaj grupoj starigis porkobredejojn. Kiam komunumanoj bredas porkojn, kolektivo donas aktivan subtenon kaj konvenan favoron koncerne al bezonataj kapitalo, porkidoj, nutraĵo k. a. Dum la praktikado de la supre menciita ĝusta principo kaj ĉiuj aliaj aranĝoj celantaj disvolviĝon de porkobredado, la renegato Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en diversaj lokoj faris oponon kaj malhelpon. Ili jen distrumpetis kolek-

tivan bredadon kaj malpermesis privatan bredadon, jen malorganizis kolektivajn porkobredejojn kaj pledis por privata bredado. La vastaj amasoj de komunumanoj firme opoziciis kaj kritikis tiun eraran linion kaj senĉese disvolvis la porkobredadon.

Pro energia disvolvo de bredado de porkoj kaj aliaj brutoj, plimultiĝis organika sterko, pliboniĝis la grundo kaj sekve ankaŭ greno produkto akiris akcelon. Unu el la multaj ekzemploj de tio estas tiu de Ŝimensong-brigado de Janggu-gubernio, Ŝandong-provinco. Plejparto de la kampoj de tiu brigado estis salalkala kaj antaŭ la Liberiĝo la pomua produktokvanto de greno estis malpli ol 50 kg. En la lastaj jaroj ĝi disvolvis bredadon de porkoj kaj fariĝis avangarda unuo kun multe da porkoj, multe da sterko kaj multe da greno. En 1970, la nombro de ĝiaj bredataj porkoj pli ol duobliĝis kompare kun tiu de 1965, antaŭ la granda kultura revolucio. Al ĉiu muo da kampo oni donis 10 tunojn da sterko. La pomua produktokvanto de greno superis 500 kg. kaj ankaŭ la produktokvanto de kotonon pligrandiĝis.

Kun la disvolviĝo de brutobredado de nia lando, pli prosperiĝas la negoco inter nia lando kaj aliaj landoj kaj la kvanto de eksportataj viando, ovoj, haregoj kaj aliaj produktaĵoj plimultiĝas jaron post jaro.

Notoj

pri Kazaha Stepo

EN la supra baseno de Ili-rivero de ĉina Hingiang, sin trovas bela kaj riĉa ebenejo en la valo de Tianŝan-montaro, kiu estas la fame konata Gongnajsistepo kaj la hejmloko de la "Hingiang-aj fajnlanaj ŝafoj". Tie loĝas nia frata kazaha popolo faranta sian kontribuon por disvolvo de la brutobredado de nia lando.

LA FAMILIO DE FUTABAĴI

La familio de Futabaĵi estas unu el la miloj kaj miloj da ekzemploj de kazahaj familioj sur la stepo tutkore klopodantaj por la bono de la kolektivo.

Komence de la kuranta jaro, falis neĝflokoj dum pluraj tagoj sur la paŝtejoj, la vojoj estis obstrukcitaj, la herboj estis kovritaj de dika neĝtavolo kaj la ŝafaroj ne povis esti paŝtataj. La konservata fojno malmultiĝis tagon post tago kaj la ŝafoj pli kaj pli malgrasiĝis. Brule maltrankviliĝis la tuta familio de Futabaĵi. En tiu malfacila cirkonstanco, la sep membroj de la familio kunsidis por solvi tiun problemon. Futabaĵi ekparolis la unua: "En la malnova socio, ni malriĉaj paŝtistoj laboris kiel brutoj por la brutoposedantoj kaj devis paŝtadi kiel ajn furiozis neĝblovo. Kiom da paŝtistoj mortis de frosto kaj malsato. Estis Prezidanto Maŭ, kiu savis nin el la suferoj. Ni nepre devas bone memori la instruon de Prezidanto Maŭ pri ekskluziva kaj senrezerva servado al la popolo, venki la malfacilojn kaj vivteni la ŝafaron de la kolektivo!" Ĉiuj diris siajn opiniojn, aktive kaj rapide alprenis kontraŭrimedojn por protekti la brutojn.

Ili apartigis la malfortajn ŝafojn el la ŝafaro kaj ilin kondukis en la lanan jurton por zorge ilin

flegi. Renkonte al la neĝblovo, la pli ol 70-jara Futabaĵi kaj lia unua filo kune kondukis la fortajn ŝafojn paŝtiĝi sur krutan montodeklivon, kie ne akumuligis neĝo. La neĝostormo frostis ĝisoste, sed ili ne timis la malfacilojn, persistis en paŝtado kaj fine venkis la katastrofon de neĝostormo. En printempo de la kuranta jaro, 150 gravediĝintaj ŝafinoj sekure naskis ŝafidojn, kiuj senescepte vivas sane. Antaŭ nelonge, la patro kaj filo ambaŭ estis elektitaj kiel aktivuloj de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso.

ANTAŬENMARŜAS KIANGIN-KOMUNUMO

En Hinjuan-gubernio sur Gongnajsistepo estas Kiangin-komunumo, kiu ĉefe okupiĝas pri paŝtado. Por pli multe kontribui al la ŝtato, la paŝtistoj de tiu loko klopodas por trovi novan vojon de stabila pliprodukto en brutobredado.

Kvankam tiu komunumo havas sufiĉe vastan paŝtejon, tamen la herboj estas malmultaj kaj ne tiel bonkvalitaj, kaj malmulte da brutoj devis pereji, je okazo de serioza neĝostorma katastrofo. Kaj krome, tie la vintra paŝtejo ne havis stalojn kaj kapablon kontraŭkatastrofan, vintre oni devis fari longan migradon trans montoj al suda Hingiang kun grandaj brutaroj por pasigi la frostan sezonon. Paŝtistoj diris: Kvankam niaj brutaroj ĉiam pli grandiĝas, tamen ni povos akiri ankoraŭ pli grandan kreskon de ili, se ni solvos tiujn problemojn.

Post diskutado, la amasoj konkludis ke tiu ŝtato estas ĉefe kaŭzita de tio, ke iuj ankoraŭ havas



Kadroj kaj komunumanoj legas ĵurnalon.

la rutinan penson de “bestobredado depende de la naturo.” Ekzemple, iuj diris: “De la antikveco kiaj herboj kreskas sur la stepo, tiajn la brutoj ĉiam manĝas. Estas tre malfacile reformi la vastan stepon.” Aliaj diris: “Ni aŭdis nur, ke paŝtistoj paŝtas, sed neniam aŭdis pri tio, ke paŝtisto scipovas konstrui domon.” La vastaj amasoj de paŝtistoj opiniis, ke dank’ al la kolektiva forto de la popola komunumo, ĉia malfacilo estas venkebla, se nur ili havas decidemon. Ili persistis en hakado de arboj en montaro spite al neĝblovo kaj en alportado de akvo kaj ŝtonoj por konstrui stalojn. Maljuna malriĉpaŝtisto Ŝalejdibajke multfoje iris al agrikultura regiono por pririgardi kaj lerni teknikon de konstruado de domoj kaj baldaŭ fariĝis sperta ĉarpentisto. En la pasintaj kelkaj jaroj, li ne nur persone partoprenis en konstruado de multaj staloj kaj loĝdomoj, sed ankaŭ elkulturis nombbron da novaj ĉarpentistoj.

En la lastaj tri jaroj, la malriĉpaŝtistoj kaj malsuperaj mezpaŝtistoj kun la revolucia spirito de

sinapogo sur la propraj fortoj konstruis entute 386 stalojn, 191 akuŝejojn de ŝafinoj, stacion por artefarita fekundigo, sanigan banejon, tenejojn kaj loĝejojn por la paŝtistoj kun pli ol 700 ĉambroj, tiel ke ĉiu brutaro havas sian stalon kaj ĉiu familio havas sian loĝdomon.

La paŝtistoj konstruis kanalon, reformis 9,800 muojn da herbejoj, kulturebligis pli ol 10,000 muojn da tero kiel bazon de furaĝo kaj trahakis paŝtan vojon de 20 kilometroj tra montoj. Ili pretigis 15 paŝtejojn kaj havas superfluan furaĝon, multe pligrandigis sian rezistan povon kontraŭ katastrofoj kaj garantiis stabilan pliprodukton de brutobredado. En la pasinta jaro, la nombro de brutoj de la tuta komunumo duobligis kompare kun tiu post la komunumigo kaj kreskis je 9% kompare kun tiu en la antaŭlasta jaro.

STEPO EN ĜOJO

Ĉirkaŭ la fino de junio kaj la komenco de julio, estas sezono por detondi lanon. Kun ĝojo pro la

riĉa rikolto, paŝtistoj streĉe laboras tenante elektajn tondilojn. Ĉe la aĉeta stacio, lano amasiĝis kvazaŭ monto. Kamionoj kaj ĉevalaj veturiloj plene ŝarĝitaj de lano rapidas en kontinua kolono al lanŝpinejo.

Surbaze de disvolviĝo de produktado, la vivo de la paŝtistoj pliboniĝas jaron post jaro. Antaŭ la Liberiĝo, dezerteco regis sur la vasta stepo kaj la malriĉaj paŝtistoj vivis nomade en ĉiuj sezonoj. Post la Liberiĝo, sub la zorgado de la Partio kaj Prezidanto Maŭ, ili konstruis siajn hejmojn sur la stepo kaj efektiviĝis kombinon de agrikulturo kaj paŝtado. Nun, tie jam aperis multaj vilaĝoj kaj urbetoj kaj en iuj el la urbetoj jam troviĝas lernejoj, hospitalo, banko, librejo, butikoj, disaŭdiga stacio, veterinara servo, poŝtejo kaj riparejo de traktoroj. Ĉe iuj lokoj oni ankaŭ starigis malgrandajn elektrejojn. Nokte brilas lampoj. Ŝaltinte sian radio-ricevilon paŝtistoj tuj povas aŭdi voĉon el Pekino.

Paŝtisto Jizan ofte ŝatas rakonti pri la ŝanĝiĝo de sia familio al la vizitantaj gastoj. Lia familio konsistas el sep membroj. Lia plej aĝa filo lernas en elementa lernejo. En la malnova socio, Jizan komencis paŝti ŝafojn por brutoposedanto en sia 11-jara aĝo. Li vivaĉis pli mizere ol ŝarĝbruto kaj post penlaborado de dekelkaj jaroj ĝis la Liberiĝo li eĉ ne posedis solan ŝafkruron. Nun lia tuta familio havas sufiĉe da vivbezonaĵoj. Lia lana jurto estas bone meblita, sur la planko sterniĝas bela tapiŝo kaj ĉemure metiĝas unu sur alia 7 dikaj vatitaj litkovriloj kun belaj desegnoj kaj unu kudromaŝino. En la pasinta jaro, krom greno por manĝo, lia familio enspezis ankaŭ pli ol 600 juanojn da kontanta mono. Ĉiufoje kiam Jizan parolis pri la nova vivo sur la stepo, li diris emocie: Komparante la nunan socion kun la malnova, mi ankoraŭ pli amas socialismon kaj Prezidanton Maŭ. Sen la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ, kiel povas esti la nuna feliĉo de la kazaĥa popolo!

Ĉevalaroj sur la kazaĥa stepo




Iom-post-ioma Mekanikigo de Brutobredado

NIA produkta brigado Giergalangtu lokiĝas en la norda limregiono de nia lando. Ĝi estas brutobreda brigado sur la stepo Hilinguole de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio. De multaj jaroj, ni energie entreprenis fundamentan konstruadon kaj mekanikigon de brutobredado sur la stepo, konstruis domojn kun 124 ĉambroj per niaj propraj fortoj kaj rekonstruis 30 simplajn stalojn en fiksajn stalojn. Nun ni jam havas 2

traktorojn, 2 remorkojn, 1 dizelon, 1 benzinan motoron, 11 herbofalĉajn maŝinojn, 1 semilon, 2 draŝilojn kaj aliajn agrikulturajn kaj brutobredajn maŝinojn kaj instrumentojn kiel noriojn kaj lakto-apartigilojn. Falĉado, kolektado kaj transportado de herboj, trinkigo de brutoj, prilaborado de lakto, plugado, semado, draŝado kaj transportado estas jam mekanikigitaj aŭ duone mekanikigitaj, kio akcelis la disvolviĝon de brutobredado. En 1970,

Paŝtistoj de la Giergalangtu-a Produkta Brigado de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio kolektas herbojn per maŝino.



Havante pumpmaŝinon ili ne nur solvis la problemon de trinkakvo de homoj kaj brutoj, sed ankaŭ tiun de irigaciado de kampoj por furaĝo.



la totala nombro de la brutoj de la brigado atingis 13,777, t.e. 63% pli multe ol en 1961. De 1965 ĝis 1970, ni vendis al la ŝtato pli ol 13,000 brutojn, pli ol 20,000 pecojn da ledoj kaj 105 tunojn da lano.

En 1955, responde al la alvoko de Prezidanto Maŭ, ni efektivigis kooperigon, kaj fariĝis mastroj en politiko. Ankaŭ la kolektiva ekonomio havis disvolviĝon kaj ni komencis trinkigi la brutojn per puta akvo. Sed tiam ni havis nur du putojn sur la stepo kun diametro de pli ol 50 km., tial ankoraŭ estis granda malfacilo en provizo de akvo bezonata de homoj kaj brutoj. Ĉar en nia brutobreda regiono estas malmultaj laborfortoj kaj multaj brutoj, estas malfacilege ĉerpi akvon el puto per homa forto por trinkigi mil brutojn. Por solvi tiun problemon, ni aĉetis norion per kolektiva fonduso. Dank' al uzo de norio en trinkigo de brutaro, kvinobligis la laborefiko kaj sekve de la mallongigo de la tempo bezonata por trinkigo oni povas plilongigi la tempon de paŝtado, kio utilas al la disvolviĝo de brutaro. Post la fondiĝo de popola komunumo, ankoraŭ pli fortiĝis la kolek-

tiva ekonomio. Ni aĉetis la unuan herbofalĉilon tiratan de ĉevalo, per kiu ni povas falĉi pli ol 2.5 tunojn da herbo en ĉiu tago kaj 11-obligis la laborefiko. En 1963, nia brigado jam instalas norion al ĉiu trinkiga punkto kaj efektivigis duonan mekanikigon en trinkigo de brutoj kaj falĉado de herboj. Tiamaniere, ni pretigis unuapasaĵajn kondiĉojn por venki naturajn katastrofojn. Poste, ni aĉetis traktorojn kaj herbofalĉajn maŝinojn. Ĉiu herbofalĉa maŝino povas kolekti pli ol 25 tunojn da herboj en ĉiu tago, t. e. dekoble pli multe ol brutotirata falĉilo kaj centoble pli multe ol homa falĉado. La paŝtistoj ĝoje diris: "Mekanikigo povas ŝanĝi la stepon, ŝanĝi la malnovan kutimon kaj konstrui novan paŝtan regionon." En la produkta batalo, ni paŝtistoj profunde konis, ke la mekanikigo en la brutobreda regiono koncernas la fundamentan problemon de iro de socialisma vojo. Havante la gvidon de Prezidanto Maŭ kaj efektiviginte mekanikigon, ni certe povos konstrui socialisman novan regionon de brutobredado. Dum la jaroj de la granda kultura revolucio,

nia brigado aĉetis pli ol 20 diversajn maŝinojn por brutobredado. Nun amasa movado de mekanikigo de brutobredado estas en disvolviĝo.

En la komenco, ni ne havis monon por aĉeti maŝinojn kaj ne scipovis ilin manipuli. Kion fari? Ni decidis solvi la problemojn per la fortoj de la amasoj. Ni aktive disvolvis la kolektivan ekonomion kaj faris multajn klopodojn en produkto. En 1970, ni mem starigis fabrikan de laktopulvoro, kiu ĉiujare povas produkti 1 tunon de laktopulvoro kaj fromaĝo. Krome ni plimultigis la kolektivan enspezon ankaŭ per produkto de greno kaj furaĝo por pligrandigi nian aĉetpovon de maŝinoj. Samtempe ni ĝuste traktis la rilaton inter akumululo kaj konsumo, konvene plimultigante la akumulon surbaze de ĉiujara altigo de la vivnivelo de la paŝtistoj, por garantii senĉesan pligrandigon de reprodukto. La totala sumo kolektive akumulita dum la kvin jaroj de 1966 ĝis 1970 atingis 120,000 juanojn. En tiuj jaroj, ni elspezis pli ol 50,000 juanojn por aĉeti diversajn maŝinojn por brutobredado, pagis ĉ. 10,000 juanojn por riparado kaj elspezis ĉ. 50,000 juanojn por fundamenta konstruado de la stepo. Ni postulis neniun groŝon da helpmono de la

ŝtato kaj faris ĉion per la fonduso akumulita de la kolektivo.

Dank' al iom-post-ioma mekanikigo, multe da homfortoj estas ŝparitaj kaj la brutobredado disvolviĝis firmaŝe, tiel ke pligrandiĝis nia forto por venki naturajn katastrofojn kaj rapidiĝis la fundamenta konstruado de la stepo. Nun ni jam konstruis 48 putojn kaj tiel ebligis al ĉiu brutaro havi sian puton. Ni kreis bazon de furaĝo kun areo de pli ol 1,000 muoj. En 1970, ni rikoltis pli ol 45 tunojn da greno, kio kontentigis la bezonon en bredado de brutoj kaj parte kontentigis la bezonon de homoj. Ni kolektis pli ol 1,500 tunojn da herboj, el kiuj ni liveris al aliaj brigadoj parton kaj rezervis pli ol 25 tunojn por vintra bezono. La paŝtistoj forlasis la jurtojn kaj enloĝiĝis en domoj kun hejtata terlito. La ŝafoj, bovoj kaj ĉevaloj havas simplajn aŭ fiksjajn stalojn kaj unuapaŝe efektiviĝis paŝtado je fiksluado. Multe altiĝis la kvalito de la brutaro, el kiu la plibonigitaj brutoj okupas ĉ. 41%. En vintro de la pasinta jaro kaj printempo de la kuranta jaro okazis eksterordinare granda neĝoplago, sed dank' al la fundamenta konstruado kaj mekanikigo, ni venkis la naturan katastrofon kaj akiris bonan rikolton en brutobredado.



Prilaboro de lakto per apartigilo



La Akvario de Kingdaŭ

LA Akvario de Kingdaŭ estas unu el la vizi-tindaj lokoj de tiu bela apudmara urbo. Tie oni bredas kaj ekspozas multajn marajn produktaĵojn de nia lando kaj montras la kontribuojn de la vastaj amasoj de fiŝistoj, fiŝproduktaj kaj oceano-grafiaj laborantoj en ekspluatado kaj utiligado de maraj riĉfontoj por la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado. Troviĝante en la akvario, oni sentas kvazaŭ en maro. Diversaspekaj fiŝoj senĝene naĝadas kaj diversaj salikokoj kaj kraboj kun malsamaj formoj svingadas siajn pinĉilojn kaj palpilojn eligante vicojn post vicoj da veziketoj.

La Akvario de Kingdaŭ fondiĝis en 1931. En la malnova Ĉinio, sub la agresado de la japana kaj usona imperiismo kaj la putra regado de la kuomintanga reakciularo, ĝi estis en mizera stato pro manko de riparo dum longa tempo kaj ĝi povis bredi nur dek kelkajn specojn de animaloj el la maro proksima de Kingdaŭ.

Post la liberiĝo de Kingdaŭ, la akvario estas renovigita kaj senĉese plivastiĝis, ĝiaj ekipaĵoj kaj ekspoziciaĵoj pli kaj pli multiĝis, kaj ĝi fariĝis ekspoziciejo por konigi niajn marajn produktojn kaj kulturi la amon de niaj rigardantoj al la maraj riĉfontoj de la patrolando. Ĉiutage, miloj kaj miloj da laboristoj, kamparanoj kaj lerneĵanoj ĝin vizitas kaj de tempo al tempo ankaŭ fremdlandaj amikoj.

Nun en la akvario diversaj specoj de animaloj el niaj proksimaj maroj estas bredataj kaj krome estas ekspoziciataj en ĝi specimenoj de ĉ. 600

specoj de maraj bestoj kaj kreskaĵoj el diversaj proksimaj maroj de Ĉinio.

En la akvario, oni povas vidi ne nur la ekonomiajn fiŝojn de norda Ĉinio kiel ruĝan pagron, nigran pagron, perkon kaj globfiŝon, sed ankaŭ holoturion, halioton, limulon, grandan kelonion kaj salikokon el la Flava Maro kaj la maro Bohaj. Tie vivas ankaŭ fokoj el malvarma akvo kaj eĉ naskis plurajn fokidojn sub bredado. En la akvario vivas ankaŭ perlkonkoj. Perlo estas ne nur uzata kiel ornamo, sed ankaŭ kiel valora medikamento. El sia praktika sperto

Foko



niaj perlokonkobredistoj eltrovis novan sciencan metodon por kreskigi perlojn kaj multe akcelis la disvolviĝon de bredado de perlokonkoj. La speco de grandaj salikokoj bredataj en tiu akvario estas fame konata produktaĵo de Ĉinio. Ĝi estas tre bongusta kaj ŝatata en internacia merkato kaj havas altan valoron en ekonomio.

La ekspozitaĵoj de la akvario montras, ke Ĉinio havas grandan maran riĉfonton kaj multajn specojn de fiŝoj, el kiuj la kvar ĉefaj specoj estas granda flava fiŝo (*Pseudosciaena crocea*), malgranda flava fiŝo (*Pseudosciaena polyactis*), sepio kaj trikiuro. Ĉiam pli grandiĝas la kvanto de kaptitaj fiŝoj, kun la disvolviĝo de nia marprodukta entrepreno.


En la akvario oni bredas ankaŭ malgrandajn animalojn similajn al arbobranĉoj — gorgonion. Pli ol 20 varioj de koralo estas ekspozitaj tie. Koraloj vivas arope kaj generas tre rapide. Ĝia ĉefa produktaĵo de nia lando estas la Suda Maro. Iuj el la insularoj Hiŝa kaj Nanŝa estas formitaj el koraloj.

Krom la malgrandaj animaloj, en baseno de la akvario vivas ankaŭ grandaj animaloj kiel marporkoj. Marporko estas mamulo, speco de baleno. En ĉinaj maroj vivas ĉirkaŭ 20 specoj de baleno inkluzive de marporko, balenoptero, longbarta baleno, kiu povas kreski ĝis la pezo de 50-60 tunoj. Kaptado de balenoj komenciĝis ĉe ni nur post la fondiĝo de la nova Ĉinio.

Krom la maraj animaloj, oni povas vidi en la akvario ankaŭ multegon da maraj kreskaĵoj, el kiuj iuj estas kulturataj. Inter aliaj troviĝas la manĝeblaj purpura legomo (*Porphyra tenera*), ŝtonfloro (*Gelidium cartilagineum*), cervokorna legomo (*Chondrus ocellatus Holmes*) kaj valora korna gelidion. Ne nur en norda Ĉinio oni nun grandkvante kulturas laminarion, sed ankaŭ en maroj de suda Ĉinio jam komencis ĝian kulturadon. Ni jam povas ankaŭ eksporti ĝin, krom kontentigi la enlandajn bezonojn.




Pagro



Naĝa krabo

Specimenoj de koralo



Konstruado de Ŝoseoj en la Montregiono Juehi



AN GUĈUAN

JUEHI-GUBERNIO en la sudokcidenta parto de Anhuj-provinco situas en Dabie-montaro. Antaŭ la Liberiĝo, neniu ŝoseo troviĝis en tiu gubernio, kaj oni devis transporti materialojn en kaj ekster ĝin nur per homa forto. Ĉar estis tre malfacile elporti la produktaĵojn de la montregiono kaj enporti necesajn varojn en ĝin, la tiea popolo vivis tre mizere.

Post la Liberiĝo, sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio la popolo de Juehi faris la agraran reformon kaj la agrikulturan kooperigon kaj dank' al tio la produktado de tiu loko senĉese disvolviĝis, iom post iom altiĝis la vivnivelo de la popolo kaj ĉiam intensiĝis la komercado inter la urbo kaj kamparo. La transportado per homa forto ne plu povis kontentigi la bezonon de la tiea konstruado. Tiam, konstrui ŝoseojn sur la altaj montoj kaj pliapaŝe disvolvi la ekonomion en la montregiono por subteni la konstruadon de la lando fariĝis urĝa postulo de la tiea popolo.

En la jaro 1957, la ŝtato alsendis termezuran taĉmenton por helpi la popolon de Juehi en difino de ŝosea linio. Informiĝinte pri tio, popolanoj en la tuta gubernio konkure sin anoncis por partopreni la konstruadon de ŝoseo. Formiĝis baldaŭ vojkonstrua trupo kaj marŝis en la altajn montojn.

Disvolvante la spiriton de sinapogo sur propraj fortoj kaj penema luktado en malfaciloj, la vojkonstruantoj laboris peneme kaj lerte, venkis multajn teknikajn malfacilojn kaj trahakis multajn krutegajn rokmurojn. En iom pli ol unu jaro, ili jam finkonstruis serpentuman ŝoseon kun longeco de pli ol 50 kilometroj. En la inaŭgura tago de la ŝoseo, printempe de 1958, popolanoj inkluzive de infanoj kaj malfortaj aĝuloj venis al la gubernia urbo por partopreni la ceremonion. Palpante la novajn kamionojn produktitajn de nia lando maljunuloj emociiĝis ĝis larmoj...

La fondo de popola komunumo alportis ankoraŭ pli belan perspektivon al la disvolviĝo de la trafiko en la montregiono. Ne longe post la malfermiĝo de la unua ŝoseo al trafiko, komenciĝis la konstruado de la ŝoseo de Juehi al Ŝuĉeng-gubernio.

Tiu ŝoseo devis trapasi krutegan rokmuron Longvangja. Tie staras multaj strangaj rokoj, torentas akvofalo kaj altas krutega rokmuro sub kiu kuŝas profunda abismo. Estis tre malfacile konstrui ŝoseon en tiu loko.

Je fino de vintro, vojkonstrua trupo formita el popolanoj de Juehi-gubernio akceptis la taskon de konstruado de tiu parto. En profunda nokto,


la laborantoj bruligis rezinan lignon en la barakoj por studi la verkon de Prezidanto Maŭ *Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo*. La brila figuro de Malsaĝa Avo havigis al ili kuraĝon kaj forton por venki la malfacilojn. Ili diris: "Se Malsaĝa Avo povis translokigi du monteĝojn, ni certe povas elhaki vojon en la rokmuro!"

Apenaŭ elkrepuskiĝis la novjara tago de 1960, kiam junulo Ĉen Hiaŭpang surgrimpis la rokmuron kun 20 fortaj junuloj sub sia gvido. Ĉen Hiaŭpang ligis sin per ŝnurego je la talio kaj la unua malsupreniĝis de la supro de la rokmuro. Ankaŭ la aliaj lin sekvis. Malfacile ili boris mintruojn per borstangoj kaj marteloj, eksplodigis la rokmuron kaj formis en ĝi parton post parto koridoron de la ŝoseo.

Je sereniĝo post neĝado, pli intense iris la konstruado. Neĝo degelis en la sunbrilo. Defalintaj glaciaj pecoj falis de tempo al tempo de sur la rokmuro kune kun koroditaj ŝtonoj, minacante la vivon de la eksplodigistoj. En kriza momento kiam granda kvanto da glaciaj pecoj defalis, Ĉen Hiaŭpang aplombe helpis aliajn translokiĝi sekure.

Subite tri torentoj de glacioj kaj ŝtonetoj alfluis kaj puŝis lin en profundan ravinon. Por la bono de la popolo, Ĉen Hiaŭpang glorie oferis sian junan vivon. Lia nobla revolucia sindonema spirito kuraĝigis la vojkonstruantojn al ankoraŭ pli brava batalado, kaj fine ili konstruis la ŝoseon kun longeco de 5,000 metroj sur la rokmuro Longvangja.


En la Granda Proletara Kultura Revolucio, pli rapide disvolviĝis la konstruado de ŝoseoj de Juehi-gubernio. En profunda vintro de 1968, vojkonstrua trupo el 500 popolanoj surgrimpis la danĝeran Maŭaŭ-parton de la ŝoseo n-ro 0605, renkonte al neĝblovo. Sin gvidante per Maŭzedongpenso, ili kreis la rekordon de forigo de pli ol 1,500 kubmetroj da ŝtonoj per unu mineksplodo sur monto kun alteco de pli ol 1,500 metroj super la mara nivelo. En varmega somero, kiam minacis montorentoj, la laboristoj patrolis tage kaj nokte por protekti la vojon, pontojn kaj kulvertojn. Post pena luktado la laboristoj plenumis la malfacilegan taskon de konstruado de tiu danĝera parto kaj garantiis ĝustatempan malfermon de la tuta linio al trafikado. Tiu vojkonstrua trupo estis elektita kiel avangarda kolektivo kaj glorie partoprenis la



Duan Kunvenon de Rerezentantoj de Aktivuloj en Viva Studo kaj Viva Apliko de Maŭzedongpenso de Anhuj-provinco.

En la pasintaj dekkelkaj jaroj, la popolo de Juehi malfermis 5 trunkajn ŝoseajn liniojn kun totala longeco de pli ol 400 kilometroj. Kamionoj kaj aŭtobusoj kurantaj sur la interkruciĝantaj ŝoseoj sur la altaj montoj multe faciligis la produktadon kaj vivon de la montanoj.

Nun, ĉiujare ĉirkaŭ dek mil tunoj da karbo kaj kemia sterko, centoj da tunoj da insekticidoj kaj dekmiloj da agrikulturaj maŝinoj kaj instrumentoj estas enportitaj en la montregionon, kiuj forte subtenas tieajn industrion kaj agrikulturon. En la gubernia urbo, oni starigis fabrikojn por produkti elektron, agrikulturajn maŝinojn, ferajn kaj lignajn instrumentojn kaj prepari vinon kaj mangaĵojn; en la kamparaj popolaj komunumoj oni fondis prilaborejojn de greno, riparejojn kaj fabrikojn de agrikulturaj maŝinoj kaj instrumentoj, kaj iuj el komunumoj kaj brigadoj konstruis ankaŭ hidro-elektrejojn. La produktokvanto de greno altiĝis grandskale. Post kiam Guanghua-brigado de



Por etendigi la ŝoseon al primitiva arbaro

Granda kvanto da ligno estas transportata tra la ŝoseo al diversaj lokoj de la patrolando.

Dongfanghong-komunumo fariĝis atingebla per aŭtoj, oni alportis malgrandajn traktorojn kaj aliajn produktajn rimedojn. Tio akcelis la agrikulturan produkton kaj havigis al ĝi riĉajn rikoltojn en sinsekvaj jaroj. En la jaro 1970, la meznombra pomua produktokvanto de greno atingis 605 kilogramojn kaj ĝi vendis al la ŝtato 100 tunojn da superflua greno.

La bela montregiono de Juehi estas riĉa je ligno kaj diversaj valoraj drogoj kaj aliaj lokaj specialaj produktaĵoj inkluzive de fulino (*Poria cocos*) kaj hoŝoŭo (*Polygonum multiflorum Thunb*). En la pasinteco, pro malfacilo en transporto, tiuj produktaĵoj de la montaro ne povis esti utiligataj. Nun ĉiujare ĉirkaŭ 20,000 kubmetroj da ligno, pli ol 500 tunoj da fulino, hoŝoŭo kaj aliaj drogoj, pli ol 300 tunoj da teo, pli ol 10,000 porkoj kaj ĉ. 200 tunoj da ovoj estas elportataj. Tio donis fortan subtenon al la socialisma konstruado de la lando.


Post la ekfunkcio de la ŝoseoj, diversaj ŝtofoj, kaŭĉukaj ŝuoj, bicikloj, kudromaŝinoj kaj aliaj

vivbezonaĵoj de la popolo nombrantaj je dekmiloj senĉese transportiĝas en la montregionon. Kaj sole la kvanto de salo transportata ĉiumonate jam atingis 150 tunojn, kaj plene kontentigis la bezonon de la popolo. Dank' al granda disvolviĝo de la produktado kaj la plifirmigo de la kolektiva ekonomio, multe altiĝis la enspezoj de la 27 familioj de Tajjang-grupo de Tiantang-komunumo. Tiu grupo nun havas 26 maŝinojn inkluzive de muelmaŝino, koton-sensemiga maŝino, senŝeligilo de rizo kaj kotonlanugiga maŝino, kaj ĝia kolektiva akumulo atingis la sumon de pli ol 15,000 juanoj. La familio de malriĉkampano Vang Pejjang kun 8 membroj ne nur havas sufiĉe da vestoj kaj manĝaĵoj, sed ankaŭ pli ol 1,100 juanojn da ŝparmono. Li diris ĝoje: "Kompare kun la malnova socio, nun ni vivas vere en surtera paradizo kaj kun tia ĝojo, ke ni eĉ vekigis el sonĝo pro rido!"

La antaŭe malfacile atingeblaj montvaloj nun jam estas ligitaj per aŭtovojoj. Juehi estas en ŝanĝo kaj ĝi fariĝos ankoraŭ pli bela kaj riĉa.



Tang Fu, kiu zorge flegas sian kamionon, jam sekure veturis 900,000 kilometrojn.



Fulin-o produktita en la montaro estas portata aliloken tra la ŝoseo.

Vang Hin-aj Reakiris Laborkapablon

JOŬ GIE

KOMUNUMANINO Vang Hin-aj estas malriĉ-kampanino. Ŝi havis ostan tumoron pli grandan ol homa kapo sur la dekstra skapolo. Ŝia dekstra brako kuniĝis kun la tumoro kiel tenilo de martelo kaj tute ne povis moviĝi. Ŝi ne nur perdis laborkapablon, sed ankaŭ estis minacata de morto.

La osta tumoro de Vang Hin-aj kreskis jam 10 jarojn. Komence ŝi rimarkis, ke sur ŝia dekstra skapolo elkreskis tubero kaj ĝi pli kaj pli grandiĝis. En julio de 1960, ŝi iris al iu hospitalo kaj oni asertis, ke tio estas maligna osta tumoro kaj estas necese

disigi la ŝultron disde la brusto kaj amputi la dekstran brakon. Vang Hin-aj pensis: Kiel mi povus labori sen brako? Ŝi ne konsentis la kuracan metodon proponitan de la kuracistoj. Poste la tumoro fariĝis pli kaj pli granda kaj malhelpis la moviĝon de la brako, tial ŝi iris al iu granda hospitalo centojn da kilometroj fora, sed tie oni asertis la samon.

“Kiel ni komunumanoj povus ne havi brakojn en konstruado de socialismo! Ĉu estas ia metodo, kiu povas kuraci mian malsanon sed ne bezonas amputi la brakon?”

Iu burĝara “aŭtoritatulo” de la hospitalo ne donis atenton al la peto de Vang Hin-aj kaj diris indifere: “Ni ne havas tian kapablon kaj cetero en la monda medicina historio ankoraŭ ne estas tia precedenco.”

Vang Hin-aj iris milojn da kilometroj kaj vizitis plurajn grandajn hospitalojn elspezinte centojn da juanoj, sed ŝi malesperiĝis fojon post fojo. La tumoron sur ŝia skapolo pli kaj pli grandiĝis. Ŝia dekstra brako jam ne povis moviĝi, ŝia korpo perdis ekvilibron kaj ŝi tute perdis laborkapablon.

Iun julian tagon de 1970, ŝin akceptis la Unua Hospitalo de Baŭding-regiono. Amaso da kartoj de malsana historio kaj diagnozaj skribaĵoj pri ŝia tumoron vekis grandan indignon de la medicinaj

Post sia resaniĝo, Vang Hin-aj (dekstra) balaas en korto de la hospitalo.



laborantoj kontraŭ la kontraŭrevolucia reviziisma kuraca kaj higiena linio de Liu Ŝaŭki. Kamarado Mi Ji, vicsekretario de la partia komitato de la hospitalo, firme diris: “La koro de revoluciaj medicinaj laborantoj ligiĝas kun la koro de laboranta popolo. Por forigi suferojn de klasaj fratinoj, ni devas per ĉiu rimedo forigi de Vang Hin-aj la tumoron, konservante ŝian brakon por ke ŝi povu reveni al produkta posteno!”

Sub la gvido de la hospitala partia komitato, medicinaj laborantoj faris ĉiufankan kaj detalan ekzamenon al Vang Hin-aj kaj donis ĝustan konkludon: la tumoron estas benigna, sed ne maligna.

Kiel fari la operacion? Du projektoj estis elmetitaj — unu estis: amputi la tumoron kune kun la brako kaj poste rekunigi la amputitan brakon; la alia estis amputi la tumoron, sed ne difekti la ĉefajn angiojn kaj nervojn ligantajn la ŝultron kaj brakon, por garantii al la dekstra brako kiel eble plej bonan restariĝon de funkcio post la operacio. Evidente, por la paciento la unua estas pli damaĝa ol la dua, sed por la operacio la dua estas multe pli malfacila ol la unua. Tiam en ilia cerbo aperis la alta figuro de doktoro N. Bethune, kiu estis ekstreme respondecema al la laboro kaj ekstreme fervora al kamaradoj kaj la popolo. Lia spirito kuraĝigis la medicinajn laborantojn ke ili decidis alpreni la duan projekton. La gvidantoj kaj medicinaj laborantoj faris perfektan kaj detalan aranĝon kaj faris sufiĉan preparon kontraŭ diversaj eventualaj okazoj.

La 6-an de aŭgusto oni ekfaris operacion al Vang Hin-aj. Kuracisto faris tranĉon ĉe normala pozicio, sed ne trovis la subklavian arterion. Se oni ne ĉesigas la sangocirkuladon en la arterio, la operacio estos malhelpata kaj la vivo de la paciento estos minacata. Ili absorbite serĉadis kaj fine trovis ĝin en tre profunda loko sub la klaviklo. Sed ĉar la subklavia arterio troviĝis inter malnormaliĝintaj nervoj kaj vejnoj paralelaj kun ĝi, sanghaltiga prenilo estis neuzebla por ĝi. Tiam ili enigis malgrandan tirhokon, zorgeme eltiris la angion kaj aplikis al ĝi sanghaltigilon.

La sekvanta paŝo estis amputi la tumoron. Por detranĉi la tumoron sed ne rompi nervojn kaj angiojn, kuracistoj atente apartigis la nervojn kaj angiojn disde la tumoron. Kiam la operacio estis glate iranta, ili trovis, ke en la tumoron estis unu grava nervo kaj unu angio. La neatendita afero iom maltrankviligis ilin: ĉu oni povas eviti rompon de la nervo kaj angio? Ili tuj faris decidon laŭ la nova cirkonstanco: unue apartigi ĉiujn eksterajn

Kuraco kaj Higieno en Montvilaĝo

LA produkta grupo Ĉengziŝan de Mangbang-komunumo, Tengĉong-gubernio, Junnan-provinco, estas malgranda montvilaĝo kun 26 familioj. Antaŭ la Liberiĝo ĉi tie estis fama regiono de miasmo kaj ofte cirkulis malario, tifo, ĥolero k.a. epidemioj, pro kio la laboranta popolo baraktadis en malriĉeco kaj malsano kaj ĉiam estis minacata de morto. Post la Liberiĝo, dank' al la zorgo de Prezidanto Maŭ kaj la Kompartio, la infektaj malsanoj kiuj serioze minacis la popolan sanon estis iom post iom regataj kaj maloftiĝis disenterio, askarida malsano k.a. ordinaraj malsanoj en la kamparo. Post la Granda Proletara Kultura Revolucio, tiu ĉi montvilaĝo havas novan higienan fizionomion. Ĉi tie la komunumanoj kutimiĝis al higiena vivo; en kaj ekster la vilaĝo montriĝis

pureco kaj ordeco. La komunumanoj bone fartas kaj malofte malsaniĝas.

Ĉengziŝan estas loko kun krutaj rokoj kaj tre malabunda akvo, kaj ĝia produktokvanto de greno ĉiam restis malgranda. En la komenco de 1970, sub instigo de la spirito de Daĝaj, la komunumanoj decidis fosi tunelon en monto por alkonduki akvon kaj ŝanĝi la postiĝintan fizionomion de la agrikulturo. La tunelo etendiĝis pli kaj pli profunden kaj ŝvitegis ĉiuj fosantaj komunumanoj. Kiam ili iris el la tunelo kaj renkontis malvarman venton, multaj el ili malvarmumis. Sanitaristo donis al ili kuracilon laŭ okcidenta medicino, sed la efiko estis neevidenta. La malvarmumo iom post iom disvastiĝis kaj multaj el la fosantoj de la tunelo ĉesis labori pro la malsano. En tiu tempo, komunu-



nervojn kaj angiojn sur la tumoro kaj poste koncentri sian tutan forton por apartigi la nervon kaj angion en la tumoro. Kun granda atento ili fendis la tumoron kaj serĉadis en la fendo la nervon kaj angion.

Post operacio de pli ol 9 horoj estis amputita la granda osta tumoro kun pezo de 7.25 kg, kiu suferigis Vang Hin-aj 10 jarojn.

Tamen tio nur estis la unua parto de la tuta operacio. Ankaŭ la sekvanta rekunigo de la brako kun la ŝultro estis tre komplika. Post amputo de tumoro, la pacientino perdis la dekstran skapolon kaj trionon de la klaviklo, ŝia humero mallongiĝis je 8 centimetroj kaj la tuta dekstra ŝultra parto kaviĝis. Por rekunigi al ĝi la brakon kiun ligis nur kelkaj ĉefaj nervoj kaj angioj, unue estis necese krei novan ŝultran artikon kaj ŝultran parton.

Post ampleksa analizo, la kuracistoj decidis anstataŭigi skapolon per ripo de la malsanulino. Ili kreis ŝultran artikon kaj formis por ŝi novan ŝultron. La tuta operacio daŭris 23 horojn kaj 45 minutojn.

Sukcesis la operacio de amputo de la skapola osta tumoro de Vang Hin-aj! La ĝojiga informo trakuris la tutan hospitalon kaj ĉiuj varme akklamis la novan atingon. Kuŝante en lito, Vang Hin-aj palpis per la maldekstra mano la dekstran ŝultron — malaperis la tumoro kiu pezis sur ŝi por multaj jaroj; ŝi palpis la dekstran manon — ĝi estas varmeta. Kun larmoj en la okuloj ŝi diris emocie: “La proletara kuraca kaj higiena linio de Prezidanto Maŭ donis al mi novan vivon!”

Post kvinmonata zorgema flegado Vang Hin-aj resaniĝis kaj revenis al produkta posteno.

manoj Guo Daĉaŭ kaj Guo Ĝengĉun kolektis du specojn de kuracherboj, preparis el ili du sitelojn da dekoktaĵo kaj disdonis la kuracilon al la malsanuloj, kaj ĉi tiuj baldaŭ resaniĝis post preno de ĝi. Tio donis profundan inspiron al Guo Daĉang, la gvidanto de la grupo: Oni ne povas bone fari higienan laboron apogante sin sur malmultaj homoj sen mobilizo de la amasoj; ankaŭ doni atenton nur al kuraco sed ne al prevento ne estas bone. La tri "nudpiedaj kuracistoj" de la brigado respondecis pri 17 produktaj grupoj kun pli ol 2,800 membroj kaj estis tre okupataj. Ĉengziŝan situas ĉe montpiedo. En tiu loko ĉie kreskas kuracherboj, kaj krome iuj el ĝiaj komunumanoj havas sperton de prevento kaj kuraco de malsanoj. Se oni organizos la amasojn kaj helpos ilin koni kuracherbojn kaj lerni iom da kuracarto, por ke ili povu mem kolekti kuracherbojn kaj disvolvu amasan movadon de prevento kaj kuraco de malsanoj, kio povos ne nur redukti malsanojn sed ankaŭ

ebligi al iuj malsanoj esti kuracataj tuj ĉe la loko. Guo Daĉang diris sian opinion al la amasoj kaj ricevis ilian subtenon. Tiamaniere komenciĝis en Ĉengziŝan amasa movado de prevento kaj kuraco de malsanoj. Komunumanoj Guo Daĉaŭ kaj Guo Ĝengĉun la unuaj kontribuis esoterajn receptojn. Ĝang Ven-gju, malriĉkampano kun aĝo de 78 jaroj, venis al la grupa oficejo kun bastono kaj kontribuis receptojn de li mem kolektitajn en longa tempo por kuraco de kontuzo kaj batvundo, kiam li aŭdis la alvokon de la grupo pri kontribuo de receptoj. Li ankaŭ gvidis komunumanojn en montojn por konigi al ili kuracherbojn. En kelkaj tagoj la produkta grupo jam kolektis pli ol 200 esoterajn kaj popularajn receptojn kaj transplantis pli ol 160 specojn da kuracherboj. La grupo establis kuracherban ĝardenon per kiu la komunumanoj konis la kuracherbojn kaj kolektis kuracherbojn revenante de kampoj aŭ montoj.

Higiena laborantino Guo Hianghe kuracas komunumanon per akupunkturo.



Krom tio la grupo establis sian sanitarajn simple ekipitan. Ili purigis vazojn kaj botelojn por konservi medikamentojn kaj ankaŭ bambuaj tuboj estis uzataj kiel medikamentujoj. Komunumanoj faris simplajn instrumentojn por prilabori kuracherbojn. En la sanitarajo la specoj de kuracherboj fariĝis pli kaj pli multaj.

Post establo de la sanitarajo, Guo Daŝuang fariĝis higienisto. Sed ĉar la penso preni preventon kiel ĉefan ĉeneron ne enradikiĝis en lia cerbo, la laboro de prevento de malsanoj ne estis bone farita. En iu tempo, denove cirkuladis gripo.

La gvidantaj kamaradoj de la grupo rimarkis: La hejmojn de Guo Hianghe kaj Guo Damaŭ apartigas nur unu muro kaj la nombroj de la anoj de ambaŭ familioj estas ne tre diferencaj. La familio de Guo Hianghe donis atenton al pureco de siaj



Higienaj laborantoj preparas medikamenton per simplaj instrumentoj.

Guo Daĉang, estro de la gvida grupo, kolektas kuracherbojn kune kun komunumanoj.



manĝaĵoj kaj medio, persistis en preno de preventilo, tiel ke neniu el lia familio malsaniĝis; sed la familio de Guo Damaŭ ne tiel faris, tial 3 el liaj familianoj malsaniĝis samtempe. Sin trovis ankaŭ pluraj similaj kazoj en la vilaĝo. El tio la kadroj komprenis, ke sen mobilizo de la amasoj en preventado de malsanoj, eĉ higienisto kaj sanitarajo ne povas efike bridi malsanojn. Ili persone partoprenis ellaboron de regularoj pri administrado de trinkakvo, trakto al fekaĵo kaj purigado de la ĉirkaŭaĵo.

La 26 familioj de la produkta grupo dividiĝis en tri arojn por respondeci pri pureco de la vilaĝo. En postlabora tempo la komunumanoj iris al montodeklivoj kelkajn kilometrojn foraj kaj alportis de tie sablon kaj pavimis per tio vojojn, ebenigis ĉiujn vojojn en la vilaĝo, forigis la herbojn ambaŭ flanke de la vojoj. La komunumanoj konstruis latrinojn, ekstermis per kuracherboj muŝojn kaj ties pupojn, plenigis malpurajn kavegojn, purigis akvocisternojn, dragis obstrukcitajn kanaletojn kaj forigis amasojn da forĵetaĵoj kaj translokigis la kolektivajn stalon ekster la vilaĝon. Dank' al tio tute noviĝis la higiena fizionomio de la vilaĝo kaj senĉese altiĝis la nivelo de sano de la komunumanoj.



PLIPRODUKTO DE AGAVO

Ĝangpu-gubernio estas ĉefa produkto de agavo en Fugian-provinco. En la unua duono de la kuranta jaro la gubernio akiris riĉan rikolton de agavaj fibroj, kies kvanto atingis pli ol 162,500 kilogramojn kaj je 71% superis tiun de la pasinta jaro.

La agavofibroj estas grava materialo por fari kablojn uzatajn en navigado, fiŝado kaj tiel plu. De la pasinta jaro, la amasoj de tiu gubernio plivastigis la plantareon de agavoj utiligante kalvajn montojn, interŝtonajn spacojn, vojrandojn kaj bordojn, tiel ke ĝia plantareo kreskis de 15,000 muoj en 1965 ĝis 32,000 muoj.

DOKSICILINO

La novan antibiotikon doksicilinon (angle: doxycycline) kun pluroble pli forta efiko ol tiu de tetraciklino sukcesis fabriki kaj komencis pogranda produkti en julio la Kvina Medikamenta Fabriko de Ŝanhajo.

Tiu antibiotiko estas la plej facile sorbebla, plej malgrandadoze uzebla kaj plej longefika el la tetraciklina grupo. Sufiĉas preno de 0.1 gramo, por ke ĝia kuraca efiko daŭru 24 horojn. Ĝi taŭgas por kuraci diversajn malsanojn kaŭzitaĵojn de stafilokokoj, streptokokoj, kojlobaciloj, pneŭmokokoj, gonokokoj k.a.

Laboristoj, kadroj kaj teknikistoj de la Kvina Medikamenta Fabriko de Ŝanhajo sukcesis en eksperimentado de nova antibiotiko doksicilino.

FINKONSTRUO DE KLOAKA AKVEDUKTO EN ĈANGĈUN POR IRIGACIO


En la urbo Ĉangĉun de Gilin-provinco, finkonstruigis 10-kilometra subtera akvedukto por irigacii antaŭurbajn kampojn per malpura akvo el la kloakaro kiu antaŭe fluis en la riveron Jitonghe fluantan tra la urbo. Tiu konstruo turnis malutilaĵon en utilan kaj plibonigis la higienan kondiĉon de la urbo.

Ĉiutage, tra tiu akvedukto fluas 52,000 tunoj da urba malpura akvo por irigacii pli ol 20,000 muojn da kampoj. Dank' al la nitroĝeno kaj fosforo entenataj en la malpura akvo, la antaŭurbaj komunumoj povas ŝpari ĉ. 3,500 tunojn da kemia sterko en ĉiu jaro. Kaj krome, tiu konstruo ankaŭ pretigis kondiĉon por sinteza utiligo de la malpura akvo.

POMOJ KAJ ALIAJ FRUKTOJ EN TIBETO

La unua generacio de tibetaj fruktoĝardenistoj de nia lando jam sukcesis kulturi pomarbojn sur la tibeta altebenejo.

Nun en Lhasa-regiono jam fondiĝis du ŝtataj fruktoĝardenoj kaj ankaŭ la gubernioj en la ĉirkaŭaĵo de Lhasa havas fruktoĝardenojn. En la lastaj jaroj, oni plantis pli ol 70,000 pom-, persik-, pirarbojn k.a. Nun triono de ili jam komencis frukti. La pomoj tie produktitaj estas grandaj, sukriĉaj kaj dolĉaj kun maldika ŝelo. Ankaŭ ĉe Ŝannan, Ŝkaze, Ĉamdo kaj aliaj lokoj stariĝis pomĝardenoj kaj iuj pomarboj jam fruktis.



Valora Drogo - Juna Cervokorno

En la Nordoriento de Ĉinio abunde produktiĝas valora drogo — juna cervokorno.

Inter altaj montoj en la ĉirkaŭurbo de Liaŭjuan de Gilin-provinco lokiĝas ŝtataj cervobredejoj. En ili troviĝas vicoj post vicoj da puraj staloj, prilaborejoj de cervaj produktaĵoj kaj medikamento kaj preparaĵoj de nutraĵoj por la brutoj. Krome estas ankaŭ helaj kaj vastaj oficejoj, laboratorio, loĝejoj por la oficistoj kaj laboristoj, klubo ktp. La junaj cervokornoj kaj aliaj cervaj produktaĵoj estas liveritaj por kontentigi la bezonojn de la tuta popolo kaj ankaŭ eksportataj alilanden.

Antaŭ la Liberiĝo, nur dudek kelkaj makulaj cervoj (*Cervus nippon*) estis bredataj en Liaŭjuan. Post la Liberiĝo, la oficistoj kaj laboristoj de la ŝtataj cervobredejoj prak-

tikas sciencajn metodojn en bredado kaj generado de cervoj kaj zorge ilin dresas, tiel ke la nombro de la bredataj cervoj rapide kreskas, kaj nun ĝi jam ducentobliĝis kompare kun tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo. Anstataŭ bredadi en staloj, nun oni jam komencis ilin paŝti, kaj la cervobredado rapide disvolviĝas.

Oni povas diri, ke la tuta korpo de tia cervo konsistas el valoraĵoj, el kiuj ĝia juna korno estas valora drogo por fortigi homon tutkorpe. Krome, ankaŭ feto, sango, penis, testiko, tendeno, ostoj, ostiĝinta korno, vosto, internaĵoj kaj glandoj estas materialoj por fari medikamentojn. Cervajo estas malgrasa, delikata kaj bona nutraĵo. Cervoledo povas esti uzata por fari ŝuojn kaj vestojn kaj speciale prilaborita cervoledo taŭgas por purigi optikajn instrumentojn.

Makulaj cervoj (*Cervus nippon*)





Cervostaloj




En paŝtado


Dresado




Juna cervokorno


Bano







Zorga bredado



Prilaboro de junaj cervokornoj

Amasa Sporta Aktivado de Bejling-komunumo

APENAŬ vidiĝas aŭroro, kiam la produktaj brigadoj de Bejling-komunumo ekbruas kaj ĉie aperas viveplenaj scenoj: grupoj de komunumanoj kun malgrandaj agrikulturaj instrumentoj komencas sportajn ekzercojn sur draŝejoj, vojoj kaj padoj antaŭ iro al kamlaboro. Iuj el ili ludas korbopilkon, aliaj faras gimnastikan ekzercon, altsaltadon, longsaltadon, ĵetadon, kuradon... Ĉie ĉi tie oni povas vidi komunumanojn en sporta aktivado, ĉu dum laborpaŭzo aŭ post laboro.

Antaŭ ok jaroj tiu popola komunumo en malfacile atingebla regiono sur bordo de la Flava Maro jam komencis disvolvi amasan sportan aktivadon. Laŭ statistiko, nun pli ol 9,000 homoj partoprenas sportajn aktivadojn kaj tiu nombro estas pli ol 80% de la tutaj kaj duonaj laborfortoj de la komunumo. Troviĝas inter ili knaboj, maljunuloj kaj patrinoj de pluraj infanoj. Tri generacioj de iuj familioj kune naĝas kaj gepatroj kaj gefiloj kune ludas korbopilkon.

Ĉu ili estas familioj kun sporta tradicio? Ne. Antaŭ ok jaroj, tie ne tre viglis sporta aktivado kaj nur malmultaj knaboj kaj junuloj ŝatis tion. Por efektiviĝi la instrukcion de Prezidanto Maŭ "Disvolu sportajn aktivadojn kaj plifortigu la fizikan kvaliton de la popolo", la partia komitato de la komunumo faris vastan kaj profundan propagandon kaj organizan laboron inter la amasoj de komunumanoj ekde 1963 kaj kondukis ilin altigi la konon pri sporto kaj memkonscion de partopreno de sportaj ekzercoj tra praktikado. En tiuj aktivadoj de la komenca periodo, la ŝanĝiĝo de la porkobredisto Cuj Ĝongfu kaj aliaj donis fortan inspiron

al la aliaj. Antaŭe Cuj Ĝongfu estis tre malforta kaj eĉ ne povis vektporti du sitelojn da akvo, tial la porkobreda laboro estis tre peniga por li. Post sia partopreno al la sporta ekzercado, ĉiutage li sin ekzercas per ŝnur-grimpado, altsaltado kaj ludo de reko kaj paraleloj. Post certa tempo li fariĝis pli kaj pli forta. Li kaj du aliaj kamaradoj tiam bredis pli ol 100 porkojn. En sezono de intensa agrikultura aktivado, la du aliaj bredistoj iris fari agrikulturan laboron, li do sola prenis sur sin la taskon kaj tre bone ĝin plenumis. Ĝoŭ Ginmej, leterportisto de la komunuma poŝtejo, eksuferis de malsanoj kiam li estis infano. Post longa kuracado li estis resanigita, sed restis malforta kaj skeleta kun pala vizaĝo kaj pezis nur je 45 kilogramoj. Dank' al aktiva partopreno de sporto, la pezo de lia korpo iom post iom grandiĝis ĝis 65 kg., li fariĝis membro de la komunuma korbopilka teamo. Ĉiutage li senlace alportas gazetojn kaj poŝtaĵojn por la komunumanoj kaj ricevis ilian laŭdon.

El ilia ŝanĝiĝo, la komunumanoj konis la utilon de sporta ekzerco kaj ankaŭ la rilaton kaj diferencon inter sporto kaj fizika laboro. Ili diris: Nun ni komprenis, ke fizika laboro povas ekzerci nur certan parton de la korpo, dum sporto povas plene ĝin ekzerci.

Tiamaniere multiĝis tagon post tago partoprenantoj de sporta aktivado. Laŭ la agrikulturaj sezonoj kaj produktaj taskoj ili fiksis tempon kaj enhavon de sporta aktivado kaj persistas en disvolvo de multaj specoj de simpla sporta aktivado, konforme al la lokaj kondiĉoj. Kiam estas malmultaj

agrikulturaj laboroj, ili multe sportas, kaj kiam estas multaj agrikulturaj laboroj, ili malmulte sportas; en vintro ili ĉefe faras longan kuradon kaj somere naĝadon k.s. Ĉiu homo praktikadas unu aŭ du sportojn laŭ siaj propraj kondiĉoj. Nun en la tuta komunumo disvolviĝis multaj sportoj inkluzive de atletiko, pilkaj ludoj, gimnastiko, naĝado, biciklado kaj ŝnurtirado.

Por disvolvi tiel vastan sportan aktivadon inter la amasoj de komunumo, antaŭ ĉio oni renkontis la malfacilon de nesufiĉo de sportaj instrumentoj. Sed laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ **“La principo de diligenteco kaj ŝparemo devas esti observata en ĉio”**, la komunumanoj komencis sportan aktivadon utiligante naturajn kondiĉojn aŭ per memfaritaj simplaj sportiloj, ne atendante la pretiĝon de ĉiuj necesaj kondiĉoj. Ekzemple, ne havante dromon por kura kaj bicikla konkurso, ili uzis vojon kaj digon kiel dromon. Iuj korbopilkaĵoj ludejoj havas siajn korbojn fiksatajn sur muroj aŭ arboj. Ankaŭ porta vekto estas uzata kiel sporta instrumento. Ŝnuroj estas multe bezonataj tie por ŝnurtira aŭ ŝnursalta ludo kaj komunumanoj mem tordis ŝnurojn el fortikaj herboj kreskantaj en ilia loko. Tiuj simplaj


instrumentoj estas facile fareblaj kaj ripareblaj por la komunumanoj.

En la vigle disvolviĝanta sporta aktivado de la amasoj de Bejling-komunumo aperis multaj kamparanaj sportistoj. La komunumanoj elektis ilin kiel membrojn de siaj sportaj teamoj. Nun la 11 brigadoj de la komunumo jam havas siajn virajn kaj virinajn korbopilkaĵajn kaj tablotenisajn teamojn. Same kiel aliaj komunumanoj, la membroj de tiuj teamoj partoprenas produktan laboron en ordinara tempo kaj helpas ilin en sporta aktivado. En festotagoj aŭ ferioj ili partoprenas, en la nomo de sia brigado, sportan aktivadon kaj diversajn sportajn konkursojn aranĝitajn de la komunumo, brigado aŭ najbaraj brigadoj. Ĉiuj konkursoj celas nur interŝanĝon de sperto kaj altigon de la sporta nivelo, sed ne paradon de sia forto, nek kapton de trofeo. Trofeismo estas profunde kritikita de la komunumanoj. Foje, sportistoj de la 10-a kaj 11-a produktogrupoj de Dongfeng-brigado estis en intensa irado de amika ŝnurtira konkurso. Iuj el la rigardantoj de la 10-a produktogrupa kaŝe helpis siajn sportistojn kaj rezulte de tio la 11-a grupo estis venkita. Sed


Gimnastika ekzerco



*Sur korbopilka ekzercejo
de produkta brigado.*



Vang Zefang (la meza) en bicikla konkurso





Komunumaninoj en ŝnurtirado

informiĝinte pri tio, la membroj de la 10-a produktogrupa tuj serioze kritikis tiun agon: “Tian helpon ni ne devis fari.” En ligo kun tiu eraro, ili pli profunde kritikis trofeismon distruptitan de Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en sportaj rondoj kaj altigis la konscion de la komunumanoj kaj sportistoj. Poste, en ĉiu konkurso ili atentis pri komparo de penso, moralo kaj solidareco kaj ne pri la gajno kun rivalo. Kiel ajn intense iris konkurso, la teamanoj rigore observis la principon prefere perdi poenton ol vundi homon.

La komunumanoj ofte persistas en sporta ekzercado malgraŭ vento kaj pluvo kaj tiel hardas sian revolucionan volon kaj kulturajn obstinecon kaj kuraĝon. Ekzemple, en streĉa konkurso bikiĝistino Vang Zefang de Dongfeng-brigado rimar-

kis, ke iu knabo subite transkuras la dromon, kaj ŝi tuj senhezite bremsis sian biciklon. Ŝi vundiĝis je defalo, sed la knabo restis sekura. Tuj post tio ŝi postulis ke ŝi daŭrigu la konkurson, kaj akiris sukceson. La komunumanoj laŭdis ŝian revolucionan agon kaj lernis ŝian spiriton.

Dank’ al konstanta hardado, la vastaj amasoj de la komunumo havas pli kaj pli fortan korpon kaj fariĝas pli plenaj je energio, kaj pligrandiĝas ilia entuziasmo en tenado de la revolucio kaj stimulo de la produktado. La kazoj de la ĉefaj oftaj malsanoj de tiu komunumo en la pasinteco malmultiĝis ĝis 3% kaj la procento de labor-ĉesto de la tuta komunumo ĉiam restas super 98%, kio forte akcelas la disvolviĝon de produktado.



Solvi Problemojn Dank' al Enketado

TIE ĉi ni prezentu al niaj legantoj du rakontojn pri enketado kaj esplorado de kadroj kaj komunumanoj de Kiaŭtoŭ-brigado de Sangiang-komunumo, Zengĉeng-gubernio, Guangdong-provinco.

“SCIENCO” EN FOSO DE SULKO

Triangula Akvejo estas malalta kampo. Tie ofte stagnis akvo, tial la produktokvanto de rizo estis tre malalta. La komunumanoj ĉiuj postulis ĝin reformi.

Laŭ la opinio de la amasoj, la komitato de partia filio de la brigado decidis fosi sulkon por dreni la akvon kaj komisiis la taskon al komitatano Li Ŝilun.

Li Ŝilun venis al la kampo kaj vidis ke en ĝi abundas akvo. Laŭ sia sperto li decidis fosigi sulkon laŭ la kampego ĉe unu flanko kaj tuj starigis signojn por la sulko.

Post decido de la projekto, la brigado sciigis al la produktaj grupoj, kiuj uzas la kampon, ke ili asigu laborantojn por komenci fosadon en la sekvinta tago. Sed en la tago por ekfosado, neniu laboranto venis tien.

Li Ŝilun ne povis diveni la kaŭzon, li do povis nur iri inter la amasojn por fari enketon.

Iu komunumano kritikis: “Vi kadroj kredas, ke vi pensas prave, kaj post rigardo ĉe la kampo jam ordonis nin ekfosi. Ĉu pravas tia sinteno?”

La kritiko vidigis al Li Ŝilun la kaŭzon. Matene en la sekvinta tago, li denove venis al la Triangula Akvejo kun estroj de la produktaj grupoj kaj maljuna malriĉkampano. Ili faris esploron laŭ la kampego kaj interkonsiliĝis.

Montrante al la akvoplana kampo, la maljuna malriĉkampano diris: “Ambaŭ flankoj de tiu ĉi kampo estas pli altaj. Se oni fosas sulkon ĉe

unu flanko, oni ne povas fordreni la akvon kaj cetere tio bezonas multe da laboro.”

Post ĉeloka esploro, ili elmetis la proponon fosi sulkon ĉe la mezo laŭ la terformo de la Triangula Akvejo. Tio postulis malmulte da laboro, ebligis rapidan fordrenon de akvo kaj krome ankaŭ povis malaltigi la nivelon de la subtera akvo. Konstrua projekto konforma al la realo estis ellaborita.

En la sekvinta tago, ĉiuj membroj de la produktaj grupoj eklaboris kune kaj finis la drenan fosadon en nur unu tago. En la kuranta jaro, pli-produkto de frua rizo estis akirita sur la 150 muoj da tero de la Triangula Akvejo.

DAŬRIGI AŬ ĈESIGI

En la pasinta vintro, la komitato de partia filio de Kiaŭtoŭ-brigado intencis energie entrepreni kolektivitan bredadon de porkoj kaj sendis komitatano Li Mejĉeng fari enketon pri la porkobredejoj de la produktaj grupoj. Sed tiu lasta raportis al la komitato diversajn opiniojn.

Iuj el la komunumanoj diris: “La kolektiva bredado de porkoj estas laboro peniga kaj neekonomia.” Aliaj diris: “Pli kaj pli malmultiĝas la porkoj en la kolektiva bredejo. Estas preferinde tuj ĉesigi tiun laboron.”

La komitatanoj multe diskutis kaj ne povis veni al konkludo.

La komitatanoj, kiuj proponis ĉesigi la laboron, sin pravigis per tio, ke pli kaj pli malmultiĝas la kolektive bredataj porkoj, kaj iuj konsentis ĉesigi la kolektivitan bredadon. La komitatanoj, kiuj oponis kontraŭ ĉesigo, donis ekzemplojn pri bona sperto de iuj produktaj grupoj en kolektiva bredado de porkoj por montri al la aliaj, ke kolektiva bredado havas bonegan perspektivon.

Kial estiĝis malsamaj opinioj pri tiu afero? Kun tiu demando la partia komitato serioze studis

kaj varme diskutis pri koncernaj instruoj de Prezidanto Maŭ kaj faris konkretan analizon. La kamaradoj, kiuj pledis por ĉesigo, vidis nur la portempan reduktiĝon de la nombro de la kolektive bredataj porkoj kaj emfazis la neesencan, neĉefan flankon de la afero, tiel ke ili portempe ne povis klare vidi la ĝustan direkton. La komitatanoj, kiuj oponis kontraŭ ĉesigo, vidis la ĝustan direkton de firmigo de la kolektiva ekonomio per disvolvo de kolektiva bredado de porkoj en la avangardaj grupoj kaj trovis per enketado la kaŭzojn de la malmultiĝo de la kolektive bredataj porkoj, nome la kaŭzo kuŝis ne en la kolektiva bredado sed ĉefe en la malprava penso de homoj.

La komitato de la partia filio helpis iujn kadrojn starigi firman memfidon pri sukceso en kolektiva

bredado de porkoj kaj solvi unu post alia la problemojn ekzistantajn en tiu afero. Krome ĝi resumis kaj disvastigis sperton de produktaj grupoj, kiuj bone irigis kolektivitan bredadon de porkoj; samtempe, ĝi ankaŭ helpis la bredistojn altigi sian konon pri la afero. En duona jaro, la nombro de la kolektive bredataj porkoj de la brigado jam pli ol duobliĝis.

Spertinte tiun sukceson dank' al enketo, nun la kadroj de Kiaŭtoŭ-brigado jam al kutimiĝis al interkonsiliĝo kun la amasoj por fari aferojn kaj malofte decidas ion subjektivisme. La socialisma aktiveco de la komunumanoj estas pliapaŝe disvolvita, ĉar la amasoj volonte diras sian opinion al la kadroj, kiam ili trovas ion kritikindan aŭ havas proponon pri io.



ĈEĤOSLOVAKA LEGANTO O. N. SKRIBIS

Mi tre ĝojas pri sukcesoj de la ĉina popolo kaj krome tio min feliĉigas, ke mi estas informita pri giganta fariĝo je alia flanko de nia planedo.

Sincere dirite, plej plaĉas al mi bildoj de ŝatata Prezidanto Maŭ Zedong — ĉiam bele, simple vestita sen ordenoj. Tio proksimigas estron de 800-miliona nacio kun ni, batalantoj por feliĉo de tuta homaro.

ANGLA LEGANTO G. L. SKRIBIS

Mi regule ricevas la gazeton *El Popola Ĉinio* ĉiun monaton. La gazeto konstante pliboniĝas. Mi montras ĝin al miaj amikoj kaj konatuloj kiel ekzemplon de la praktika uzado de Esperanto, pro la fakto, ke oni povas lerni pri la ideoj de Maŭ

Zedong rekte el Ĉinio kaj ne el la okcidenta ĵurnalaro, kiu penas konstante etigi la atingojn de Ĉinio de hodiaŭ.

Antaŭ nelonge la Esperanta Grupo okazigis Esperantan Semajnofinon en Broadway, Worcester-shire. Ĝi estis tre sukcesa

afero, kaj sur la tablo kie ni montris diversajn Esperantajn librojn estis kelkaj senpagaj ekzempleroj de *El Popola Ĉinio*. Kompreneble ili ĉiuj estis disdonitaj, ĉar multaj personoj vole-nevole volas scii iomete pri la nova Ĉinio. Kaj je ĉi tiu semajnofino mi okazigis diskuton pri la nova Ĉinio.

Nova Esperanto-libro el Hanojo

Neforgeseblaj Tagoj

verkita de generalo Vo Nguyen Giap kaj eldonita de la Fremdlingva Eldonejo, Hanojo.

La libro, kun 194 paĝoj en formato de 13 x 19 cm., formas la unuan parton de la originalo, kiu rakontas pri eventoj en Vjetnamio dum la periodo de aŭgusto 1945 ĝis decembro 1946, t.e., de la venkoplena Ĝenerala Insurrekcio ĝis la eksplodo de la rezistmilito kontraŭ la francaj kolonistoj. Tio estas periodo decidiga, ekstreme kompleksa kaj ofte drama, kiun Vjetnamio travivis. Ĉe la centro de la sceno staras

la viva kaj atentokapta persono de Prezidanto Ho Chi Minh, dank' al kies gvidado "...tra l' rifo, antaŭen glitas la barko de la revolucio". Sekve tiu ĉi libro estas nepre necesa por ĉiuj, kiuj volas havigi al si la fontajn dokumentojn de nuntempa Vjetnamio.

Por ricevi la libron oni skribu al Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, 68 Ly thuong kiet, Hanojo, Vjetnamio.



Por aŭskulti opinion

TUN nokton antaŭnelonge, politika komisaro Vang Giekung de iu trupunujo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo revenis de kunveno kaj ricevis leteron senditan de batalanto de la 120-a artileria roto. La skribinto demandis, ĉu li havas tempon por iri al la roto, ĉar li volas diri al li sian opinion pri la laboro de la partia komitato. La komisaro tre ĝojis, vidante ke la batalantoj tiel zorgas pri la partia komitato.

En la sekvinta tago, la komisaro venis al la roto. Sed en la roto oni faris provon de edukado pri linia batalo kaj la batalanto ne havis tempon. Li kulpigis sin pensante: kial mi pensis nur ke mi havas tempon, sed ne pri tio, ĉu la batalanto estas senokupa? Li decidis viziti la batalanton en alia tempo.

En la dua fojo, Vang iris al la roto en dimanĉo. Sed la batalanto iris kun proviantisto por aĉeti grenon. La komisaro atendis lin pli ol 2 horojn, ĝis kiam kuriero venis kun sciigo, ke la komisaro tuj iru al supera instanco por partopreni gravan kunvenon. Tial li denove ne vidis la batalanton.

Post la kunveno, komisaro Vang estis tre okupita por disvolvi ĝenerale la edukon pri linia batalo en la trupunujo, laŭ la instrukcio de la supera instanco.

Kiam li akiris iom da libera tempo la 120-a artileria roto jam finis la edukon pri linia batalo inter la unuaj kaj iris al la agrikulturejo "La Sepa de Majo" por plenumi la taskon de produktado por militpreparo. La agrikulturejo distancas de la kazerno pli ol 20 kilometrojn. Ĉu tien iri aŭ ne por unu opinio? Vang relernis la instruojn de Prezidanto Maŭ pri intima rilatiĝo kun la amasoj kaj vidis, ke tio koncernas la problemon, ĉu persisti en intima rilatiĝo kun la amasoj kaj disvolvi la bonan laborstilon

de la Partio aŭ ne. Li do decidis iri al la agrikulturejo por viziti la batalanton.

Komisaro Vang ekiris matene kaj en tagmezo li venis al la loko, kie li trovis la batalanton kaj faris kun li intiman konversacion, modeste aŭskultante lian opinion. Ĉiuj estis profunde emociitaj de la faro de la komisaro. La batalantoj laŭdis: "La komisaro tiel serioze traktas la opinion de simpla batalanto, tio montras, ke lia koro vere ligiĝas kun la nia!"



Feliĉaj Fratinoj

VESPERE, mi rigardis amatoran artan prezentadon de la popolamasoj en la teatro de la tibeta aŭtonoma subprovinco. Subite aŭdiĝis sonora voĉo de la anoncantino: “La sekvonta programero: Kantado de la fratinoj Kanĝaŭcaŭ kaj Ĝuomacaŭ de Sangkel-komunumo.”

La kurteno malfermiĝis. Kun melodia sono de paŝtista fluto, aperis sur la scenejo du gaje dancantaj tibetaj junulinoj. Iliaj gaja kantado kaj viveca prezentado vekis en mia memoro neforgeblajn...

Antaŭ ok jaroj mi iris al Sangkel-komunumo por helpi ĝian laboron kaj loĝis ĉe paŝtisto Sonan. Jam delonge mi aŭdis ke Sonan havas paron da ĝemelaj filinoj, sed neniam vidis ilin en la unuaj tagoj. Iun tagon mi demandis lin pri tio. Kun malĝojo kaj indigno li rakontis al mi la travivaĵon de la fratinoj Kanĝaŭcaŭ kaj Ĝuomacaŭ.

Antaŭ la Liberiĝo de Sangkel-stepo, la edzino de Sonan laboris kiel servistino de feŭda ĉefo. Tiam ŝi gravedis je la fratinoj, sed ĝis la momento antaŭ la akuŝo ŝi estis ankoraŭ devigita de la ĉefo dorse porti akvon kaj balai la korton. Probable pro troa laciĝo de la patrino, la pupiloj de la ĵus naskita Kanĝaŭcaŭ estis kovrataj de blanka membrano. Informiĝinte pri tio lamaoj de templo asertis ke ĝi estas diablaĵo, kaj ordonis al Sonan fari oferdonon kaj preĝadon en la templo. Krome ili ankoraŭ devigis Sonan forjeti tiun kompatindan bebon en dezerton por ĝin oferi al dio. Sonan indigne brakumis la propran filineton kaj eliris. La plorado de la bebo ŝiris lian koron. Li fuĝis kun la bebo en ĝangalon. Post la Liberiĝo ĉiuj iliaj familianoj rekuniĝis feliĉe, sed post unu jaro la ĵus parolpova Ĝuomacaŭ subite trafis febron kaj poste ŝi iom post iom perdis la aŭdkapablon kaj ne plu povis voki “paĉjo, panjo”...

“Ĉu vi poste ne vizitis kuraciston?” mi demandis rigardante la ĉagrenan Sonan.

“Ho, mi ja vizitis, sed oni ne povis ŝin kuraci.”

Pro longa restado en lia domo, la knabinoj familiariĝis kun mi. Estis neatendite, ke la blinda Kanĝaŭcaŭ estas elstara en kantado. Ŝi kantis al mi multajn belajn tibetajn popolkantojn. Dum tiu tempo mi rimarkis ke ŝi ofte frotas siajn okulojn kovratajn de blanka membrano, kvazaŭ ŝi volus forŝiri la blankan membranon por vidi la aŭdeblan sed nevideblan ĝojan mondon. Sed ŝi ĉiufoje mallevis la manon en malespero kaj plue aŭskultis atente per la oreloj. Mi rimarkis ankaŭ ke dum la fratino plengorĝe kantis, Ĝuomacaŭ rigardis per siaj brilaj okuloj la senĉese moviĝantan kaj emocian buŝon de la fratino, ŝi jen tiras la orelojn jen frotas la gorĝon, kvazaŭ volus aŭskulti kaj krei, sed neniel povis...

Varmaj aplaŭdoj vekis min el la profunda rememoro. Finiĝis la prezentado. Mi haste kuris post la kulisojn. Ĉe la pordo de la teatro mi kuratingis la feliĉajn ĝemelinojn. Per duonkomprenebla tibeta lingvo mi salutis ilin: “He, knabinoj, ĉu vi ankoraŭ konas min?” Sub la luma elektrolampo, Kanĝaŭcaŭ min rigardis gape, ŝiaj brilaj okuloj kun longaj okulharoj montriĝis tre viglaj kiel tiuj de Ĝuomacaŭ, kiu estis rigardanta min apude. Post longa momento, Kanĝaŭcaŭ diris kapskuante: “Mi ne konas.” En tiu tempo Ĝuomacaŭ ĝoje kriis: “Ho, onklo! Franjo, li estas la onklo, kiu loĝadis ĉe ni! Ĉu vi memoras, ke vi multe kantis al li!”

“Jes, ni intervidiĝis antaŭ ok jaroj. Tiam vi estis infanoj, Kanĝaŭcaŭ ne povis vidi min kaj Ĝuomacaŭ ne povis flue paroli kun mi. Tamen nun...”



“Nun ĉio ŝanĝiĝis!” parolis Ĝuomacaŭ kun profunda emocio. “Estas Prezidanto Maŭ, kiu liberigis sklavojn sur la stepo kaj donis al ni suferplenaj fratinoj lumon, parolpovon kaj feliĉon.”

Mi promenis kune kun la ĝemelaj fratinoj sur larĝa strato de la nova urbo sur la stepo kaj aŭskultis ilian rakonton pri la ŝanĝoj de Sangkel-komunumo post mia forlaso.

“Depost kiam vi forlasis nian domon, ni ambaŭ trapasis kvinjaran vivon de blindulo kaj surdmutulo.” Ĝuomacaŭ diris senhalte. “De la ĉielo alflugis feliĉa nuboj. Antaŭ tri jaroj juna kuracisto — oni diris ke li laboris en iu hospitalo de Pekino — respondante alvokon de Prezidanto Maŭ, venis al nia Sangkel-stepo por fiksloĝiĝo. Ĉar li ĉiam portas okulvitrojn sur la nazo, tial oni intime nomas lin okulvitra kuracisto.”

“Ĝuomacaŭ, ne tedu per tia babilo!” Kanĝaŭcaŭ haltigis la fratinojn kaj daŭrigis. “Tiu ĉi kuracisto traktas nin paŝtistojn tre varme kaj

lia kuracarto estas tre bona. Paĉjo gvidis min kaj fratinojn antaŭ lin kaj diris: ‘Doktoro, el miaj du infanoj unu estas blinda kaj alia muta. Bonvolu esplori ĉu ili estas kuraceblaj.’ Post atenta ekzameno kaj pridemandado de la malsano, la kuracisto diris: ‘Onklo Sonan, Kanĝaŭcaŭ suferas de denaska katarakto kaj Ĝuomacaŭ surdmutiĝis de la alta febro. Verdire, mi ankoraŭ ne vidis tiajn malsanojn. Sed iuj kamaradoj de nia ĈPLA jam sukcese kuracis multajn surdmutulojn, mi nepre faros kion mi povas por resanigi la infanojn!’ De tiam li komencis kuraci nin ĉiutage...”

“Li aplikis por mi ĉefe akupunkturaron kaj faris al la fratino operacion!” Ĝuomacaŭ interrompis la parolon de sia fratino. “Nia terlito estis uzata kiel operacia stablo. Kun pinĉiloj, tranĉiloj kaj pingloj, la kuracisto, kiel brodanta junulino, atente eltiris la membranon en la okuloj de mia fratino.”

Kanĝaŭcaŭ deprenis la parolon de Ĝuomacaŭ kaj diris: “Post longa horo mi sentis ke unu el



miaj okuloj heliĝis, kaj mire kriis: ‘Ho, kion mi vidas!’ La kuracisto haste ektenis min firme kaj diris: ‘Kanĝaŭcaŭ, kvietiĝu, nun vi ne devas moviĝi.’ Kaj tuj poste li kuracis mian alian okulon. Fine li pansis miajn okulojn per dika tavolo da gazo kaj ordonis al mi kuŝi kelkajn tagojn.”

“Atendo vere malpacienca.” Mi malpaciencaĝis pro Kanĝaŭcaŭ kaj diris pretervole.

“Jes ja! Tamen la tago venis finfine: La kuracisto refoje venis al nia domo por depreni la bandaĝon de sur miaj okuloj. Kiam la lasta peco de gazo estis deprenita, mi palpebrumis miajn okulojn kaj vidis paĉjon, panjon kaj multajn samlokanojn kiuj streĉe min rigardis.” Kanĝaŭcaŭ ju pli parolis des pli ekscitiĝis, kaj pretervole ŝi ekkantis la kanton kiun ŝi ĵus kantis sur la scenejo:

*La dezerto, kiun tuŝis neniu sovaĝansero,
Nun fariĝis jam Edeno sur la tero;*

*Kaj blindul’ neniam ekvidinta lumon,
Nun feliĉe uzas la okulojn.
Kial mia kanto eksterordinare nun sonoras?
Ĉar Maŭzedongpenso sur la step’ aŭroras...*

“Kaj poste?” kun ĝojo mi demandis Ĝuomacaŭ.

“Poste fratino eklaboris kiel paŝtistino, sed mi restis ankoraŭ muta,” diris Ĝuomacaŭ. “Tiam mi vere deprimiĝis. Sed la okulvitra kuracisto konsolis min ĉiufoje en kuracado: ‘Ne malpaciencaĝu, Ĝuomacaŭ, vi resaniĝos finfine.’ Kvankam li tiel diris, tion mi tamen ne tre kredis.”

“Nun vi finfine kredas!” mi diris humore.

“Kial nun, mi jam kredis nur post kelkaj tagoj,” diris Ĝuomacaŭ kun mieno kvazaŭ en rakontado pri io interesa. “Estis fulge nigra nokto. Preterpasante la hospitalon sur la vojo de la paŝtejo al mia domo, mi trovis la fenestron de la okulvitra kuracisto lumbrila. Senbrue mi aliris por enrigardi kaj ekmiregis: La okulvitra kuracisto sidas



Ĉina Tablotenisa Teamo en Niĝerio

LA aeroplano malleviĝas tra la nuboj kaj sube prezentiĝas vasta smeralde verda tero. Niĝero, la tria granda rivero en Afriko, torentas suden, en nevideblan malproksimon. Atlantiko plaŭdas kontraŭ la bordo borderante per arĝentaj ondoj la smeralde verdan teron. Jen estas Niĝerio, bela kaj riĉa lando en la Okcidenta Afriko.

En februaro de la kuranta jaro, Niĝerio starigis diplomatian rilaton kun Ĉinio. Du monatojn poste ĝia tablotenisa delegacio vizitis Ĉinion laŭ invito kaj en la unua tagdeko de julio la Ĉina Tablotenisa Delegacio flugis al Lagos, laŭ invito de la Niĝeria Tablotenisa Asocio, kaj faris trisemajnan amikecan viziton al Niĝerio. Tio estis la unua responda vizito de ĉinaj tablotenisaj sportistoj al Niĝerio por transdoni amikecon kaj respekton de la ĉina popolo al la diligenta kaj kuraĝa niĝeria popolo kaj samtempe interŝanĝi tablotenisan teknikon kaj renovigi la amikecon kun la niĝeriaj tablotenisistoj kiuj dufoje vizitis Pekinon.

Sur la internacia aerodromo en la ĉefurbo Lagos, niĝeriaj amikoj de tablotenisa rondo, tablotenisaj sportistoj kaj amatoroj atendis gastojn el Ĉinio malgraŭ tropika pluvo. S. Bamgbade, estro de la Niĝeria Nacia Tablotenisa Teamo, alvenis bonvenigi la ĉinajn sportistojn portante sur la brusto insignon de japana-ĉina amikeco, kiun japana amiko donacis al li dum la 31-a Monda Tablotenisa Ĉampioneca Konkurso en Nagojo. Vidinte Li Fujung, Liang Liĝen kaj aliajn ĉinajn sportistojn elirantaj el la aeroplano, sportistoj Wilson kaj Obisanya k.a. kiuj vizitis Ĉinion antaŭ nelonge, iris antaŭen, varme manpremis kun ili kaj ilin salutis. Aparta varmeco markis la renkontiĝon de la malnovaj amikoj.

La ĉinaj tablotenisistoj venis laŭ invito por partopreni en la 2-a Niĝeria Tutlanda Publika Tablotenisa Ĉampioneca Konkurso kaj fari amikan viziton. Ili rigardis la viziton kiel bonan ŝancon por interŝanĝi sperton, lerni unuj de aliaj,

sur seĝo, kun mallevita kapo li palpe pikas sian nukon, kaj sur lia frunto aperis ŝviteroj kun grandeco de fabo. Vidante ke longa pinglo ĉiam pli profundiĝas en la nukon, mia koro pli kaj pli streĉiĝas. Mi vidis ke lia korpo subite ekstremis, liaj okuloj estas gapantaj kaj la manoj malleviĝis. Mi hastis al la pordo kaj puŝis ĝin, sed ĝi estis riglita. Iom poste li vekigis kaj tuj eltiris la pinglon. Li malfermis la pordon kaj diris ion. Liajn vortojn mi ne povis aŭdi kaj kun emociaj larmoj en la okuloj mi gestis al li: ‘Bonkora kuracisto, por kuraci mian malsanon vi tiel suferis. Kiel mi povas ne kredi viajn vortojn!’

“Ho, li estis faranta eksperimentadon sur sia propra korpo!” Mi profunde kortuŝiĝis de la rakonto de Ĝuomacaŭ kaj ne sciis kion diri.

Ĝuomacaŭ daŭrigis: “Jes, li preferis elteni multan suferon, sed ne volis fari eĉ unu eraran

pikon sur mia korpo. En la sekvinta tago li komencis fari pikon al mi sur la nove eltrovitaj stimulaĵaj punktoj. Kompreneble, liaj movoj estis tre delikataj, ne kiel tiuj en eksperimentado sur lia korpo. Kiam la unua pinglo enpikis, mia tuta korpo sentis elektrofrapon. Sed ĝuste en tiu momento mi ekaŭdis tre mallaŭtan kaj malproksiman voĉon. Post plurfoja pikado, la mirinda sono fariĝis ĉiam pli klara.”

Kiam mi finaŭskultis la rakonton de ambaŭ feliĉaj fratinoj, mia penso ondiĝis en la cerbo. Jam estis profunda nokto kaj mi adiaŭis ilin: “Ĝis revido! Se mi havos ŝancon, mi nepre iros al Sangkel-stepo por vin viziti.”

Ĝuomacaŭ diris: “Bone, ni bonvenigos vin vidi niajn paŝtejon kaj hospitalon, kaj ni ankaŭ petos vin viziti nian okulvitran kuraciston!”

altigi tablotenisan teknikon kaj plifirmigi la amikecon kun la niĝeriaj tablotenisistoj. Oni ofte povas vidi ilin intime interparolantaj kelkope en konkursejo aŭ ripozejo. Ili interparolis pri la renkontiĝo en Nagojo, pri la amuzado sub sakuraj arboj kaj la amikaj maĉoj en la Tokia Sporta Halo. La sportistoj de ambaŭ landoj prizorgis kaj helpis unuj la aliajn. Niĝeriaj sportistoj ofte venis al la hotelo de la ĉinaj sportistoj por ilin vidi kaj informiĝi ĉu ili akomodiĝis al la klimato kaj manĝaĵo. Iufoje, el interparolo Liang Liĝen sciis ke niĝeria sportisto Santos ne povis daŭre ludi pro vundo je la dekstra genuo, ŝi tuj reiris en sian ĉambbron, elprenis bonefikan plastron, kiun ŝi kunportis de Ĉinio, kaj donis ĝin al li.

Dum la Niĝeria Publika Tablotenisa Ĉampioneca Konkurso kaj vizito al niĝeriaj ŝtatoj, la ĉinaj sportistoj estis profunde impresitaj de la rapida disvolviĝo de niĝeria tablotenisa sporto kaj evidenta progreso de la niĝeriaj sportistoj. Dum la konkurso, niĝeriaj sportistoj ludis tre brave kaj obstine, serioze traktis ĉiun frapon, montrante en sporto la batalan spiriton de la niĝeria popolo. Niĝeriaj popolanoj, precipe junuloj, tre ŝatas tablotenison kaj ĉie en la lando aperis multepromesaj junaj tablotenisistoj. 14-jara tablotenisisto Fenuji de Ibadan ludis tablotenison tri jarojn. Li havas tre

bonan piedmovon, reagis rapide kaj estas lerta en frontmanaj kaj dorsmanaj batoj.


Por interŝanĝi sperton kaj plifirmigi amikecon, la ĉina tablotenisa teamo havis renkontiĝan kunvenon en la sporta centro de Lagos kun niĝeriaj sportistoj venintaj de diversaj lokoj de tiu lando, dum la ĉampioneca konkurso. Tio estis neforgebla renkontiĝo. Guo Liangang, la gvidanto de la ĉina teamo, en la nomo de la ĉinaj sportistoj, varme dankis la niĝeriajn amikojn por ilia gastamo, kaj donacis al ĉiu el la ŝtataj tablotenisaj asocioj ĉinajn frapilojn kaj pilkojn de marko "Duobla Feliĉo". En varma aplaŭdo la ĉinaj sportistoj kantis la revoluciajn kantojn *Marnavigo Dependas de Stiristo, Popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko Batalas por Libero* k. a. Niĝeriaj sportistoj prezentis popolajn kantojn kaj dancojn. Iliaj kantoj *Ĉiuj Junuloj Devas Ellerni Uzi Sarkilon kaj Maĉeton, Unuiĝo Kondukas al Sukceso, Kanto de Ŝafisto* k. a. vekis varmajn aplaŭdojn.

Poste, trejnistoj kaj sportistoj de ambaŭ landoj sin ekzercis ĉe 6 tabloj kaj interŝanĝis opinion pri tablotenisa tekniko. La halo estis saturita de varma kaj sincera atmosfero.

Por ke la ĉina tablotenisa teamo povu viziti en la mallonga tempo pli multajn lokojn kaj kon-

Ĉinaj kaj niĝeriaj sportistoj intime interparolas.





Dum sia vizito al niĝeria Harcourt-haveno, ĉinaj tablotenisistoj interŝanĝas sperton kun tieaj sportistoj kaj lernas unuj de aliaj.

takti kun pli multaj niĝeriaj popolanoj, niĝeriaj amikoj aranĝis por la ĉinaj sportistoj vizitojn al la ĉefurbo kaj ĉefurboj de 5 ŝtatoj. De Lagos ĝis Kaduna, la ĉefurbo de la Nord-centra Ŝtato, de kultura centro Ibadan en la okcidento ĝis Harcourt-haveno en la oriento, kien venis la ĉinaj sportistoj, ĉie ili ricevis intiman akcepton de la lokaj militaj gvidantoj kaj varman bonvenigon de niĝeriaj sportistoj kaj amasoj. Kiam ili vizitis Benin, sportistoj de la Mezokcidenta Ŝtato iris 4 mejlojn fore de la urbo por bonvenigi la ĉinajn gastojn. Kiam ili restis ĉe Ibadan kaj Enugu, niĝeriaj amikoj venis de tre malproksimaj lokoj por vidi la ĉinajn gastojn en ilia hotelo.

En iu bonveniga kunveno en Lagos, la ĉinaj sportistoj kun ĝojo vidis niĝerian maljunulon Martin Imoudu. Li estis unu el la gvidantoj de la sindikata movado de Niĝerio en ĝia frua periodo. Oni diris, ke li estis la unua niĝeriano, kiu vizitis la novan Ĉinion. La maljunulo diris al la ĉinaj sportistoj, ke li faris la viziton antaŭ kiam Niĝerio akiris sendependecon. Malgraŭ minaco kaj malhelpo de la koloniistoj, li vizitis la novan Ĉinion kaj trovis, ke ĝi estas unuigita, feliĉa kaj amika lando.

Li tre ĝojis pro la starigo de diplomatia rilato inter Niĝerio kaj Ĉinio. Li deziris pluan disvolviĝon de la amikeco inter la popoloj de ili, kaj prosperon al la Ĉina Popola Respubliko. Por esprimi sian respekton al tiu niĝeria maljunulo, kiu faris kontribuon al la disvolvo de amikeco inter ambaŭ landoj, Li Fuĵong donacis al li teaman flagon en la nomo de la ĉina tablotenisa teamo.

En la tago kiam la ĉina tablotenisa teamo forlasis Niĝerion por reveno al la patrolando, la ŝtatestro de Niĝerio Yakubu Gowon akceptis ĉiujn ĝiajn membrojn kaj faris intiman kaj amikan interparolon kun ili. Li esprimis sian ĝojon pro la reciprokaj vizitoj de tablotenisistoj de ambaŭ landoj nelonge post la starigo de diplomatia rilato inter Niĝerio kaj Ĉinio. Li petis la ĉinajn sportistojn transdoni la bondezirojn de la registaro kaj popolo de Niĝerio al la registaro kaj popolo de Ĉinio.

Pasiginte tri plezurajn semajnojn en Niĝerio, la ĉinaj sportistoj forlasis la belan landon kun profunda amikeco de la niĝeria popolo al la ĉina popolo.

Kultura Interŝanĝo

KOREA KOLORA FILMO "DUM RIKOLTO DE POMOJ" PREZENTATA EN ĈINIO

Okaze de la brila festotago de la 23-a datreveno de la fondiĝo de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio, ekde la 9-a de septembro, Pekino kaj aliaj lokoj de Ĉinio komencis projekcii korean koloran filmon *Dum Rikolto de Pomoj*.

La filmo estas produktita por celebri la 10-an datrevenon de la Plivastigita Konferenco de la Konstanta Komitato de la Centra Komitato de la Korea Labora Partio okazigita en la gubernio Puk Ĉong. La filmo prezentas la venkon de progresema revolucia penso de revoluciaj amasoj de Sokhŭa-agrikulturejo super erara konservativa penso. La filmo montras la sinforĝesan, kreivan laboron kaj revolucion batalan spiriton de la heroa korea popolo kiu firme respondas la alvokon de sia granda gvidanto Ĉefministro Kim Il Sen farita en "Pukĉong-konferenco", por konstrui sian patrolandon pli bela kaj riĉa.

La filmo estis produktita de la Korea Ŝtata Arta Studio kaj tradukita de la Ĉina Ĉangĉun-a Studio.

LA ĈINA BALETA TRUPO FLUGIS AL ALBANIO

Laŭ invito de Albanio, la Ĉina Baleta Trupo forlasis Pekinon kaj flugis al Tiraneo per specialaj aeroplanoj en la 4-a de septembro, por fari viziton kaj prezentadon.

La trupo konsistas el pli ol 200 personoj. La estro de la trupo estas Ĝoŭ Kiuje, la ĉefsekretario de la Ĉina Popola Instituto de Eksteraj Aferoj, la vicestroj estas Liu Kingtang kaj Diaŭ Kejuan. Post la vizito en Albanio, la Ĉina Baleta Trupo vizitos Rumanion, Jugoslavion kaj iujn landojn de Okcidenta Eŭropo por fari prezentadon.

En Albanio kaj aliaj landoj, la Ĉina Baleta Trupo prezentos revoluciajn modernajn baletojn *Ruĝa Virina Taĉmento*, *Blankhara Knabino* kaj fortepianan konĉerton *La Flava Rivero*. La ĉefaj baletistoj de la trupo estas Liu Kingtang, Hjue Ginghua, Song Ĉen, Ju Lejdi, Li Hinjing, Vang Guohua, Caj Liĝen, Ĝang Ĉunzeng; la direktoroj

de la orkestro estas Han Ĝonggie kaj Vang Ĵuoĝong, la pianisto estas Jin Ĉengĝong. La ĉefsekretario kaj vicĉefsekretarioj de la trupo estas Gin Ĉangju, Ĉoŭ Liang kaj Hju Juan.

Forlasante Pekinon, la revoluciaj artistoj de la Ĉina Baleta Trupo kun ĝojo esprimis, ke ili modeste lernos de la popoloj de la landoj en kiuj ili faros prezentadon, kaj faros kontribuon al plifirmigo de la amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj aliaj landoj.

LA PEKINA PEKINOPERA TRUPO VETURIS AL KOREIO

Invitite de la Komisiono por Kulturaj Rilatoj kun Aliaj Landoj de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio, la Pekina Pekinopera Trupo forlasis Pekinon kaj veturis per vagonaro al nia frata najbaro — la Demokratia Popola Respubliko de Koreio je la 2-a de septembro, por fari viziton kaj prezentadon. La trupo estas sub gvido de la estro Tian Guangven kaj la vicestro Tan Juanŝoŭ kaj konsistas el 141 personoj.

La trupo prezentos al la frata korea popolo revoluciajn modernajn pekinoperojn *Ŝagiabang* kaj *Sagaca Kapto de la Tigra Monto*.

La ĉefaj aktoroj de la trupo estas Tan Juanŝoŭ, Ma Ĉangli, Hong Hjuefej, Van Jijing, Ĝoŭ Hetong, Geng Kiĉang; la ĉefsekretario de la trupo estas Jang Hujŝeng kaj la vicĉefsekretario estas Hjue Ginhoŭ.

Ricevinte la gloran taskon de vizito kaj prezentado al Koreio, la revoluciaj artistoj de la Pekina Pekinopera Trupo sentis grandan ĝojon. Kun profunda amikeco de la ĉina popolo al la korea popolo, ili esprimis, ke ili lernos de la heroa korea popolo kaj koreaj artistoj dum la amika vizito, por fari kontribuon al plifirmigo de la granda amikeco kaj batala unuiĝo inter la ĉina kaj korea popoloj fonditaj per sango.

ĈINA TABLOTENISA DELEGACIO FLUGIS AL KUBO, ĈILIO K.A. LANDOJ

En la 3-a de septembro, sub la gvido de la estro Ŝi Juĉang, vicestroj Jue Dajheng kaj Ĝuang Zedong, la Ĉina Tablotenisa Delegacio forlasis Pekinon kaj flugis al Kubo, Ĉilio kaj aliaj landoj por fari amikan viziton.

La delegacio havas tri sportistinojn kaj kvar sportistojn. La sportistinoj estas Lin Hujking (kumula trejnistino de virina teamo), Jang Gjun kaj Liu Jakin; la sportistoj estas Ĝuang Zedong, Ĝang Hielin (kumula trejnisto de vira teamo), He Zubin kaj Li Ĝuomin.



BATALO POR PLENUMI LA NOVAN KVINJARAN PLANON

La vastaj amasoj de laboristoj, membroj de agrikulturaj kooperativoj kaj aliaj laboruloj varme subtenas kaj diskutas la projektan instrukcion de la Centra Komitato de la Albana Partio de Laboro pri la Kvina Kvinjara Plano (1971-1975) de la Albana Popola Respubliko por Disvolvo de Ekonomio kaj Kulturo. Ili esprimis sian decidemon batali por efektiviĝi la grandiozajn celojn de la Kvina Kvinjara Plano. La fabrikoj kaj aliaj entreprenoj de la ĉefurbo Tiraneo organizis super-vidajn grupojn el 3,000 elektitaj distingindaj laboristoj kaj teknikistoj por inspekti la diskutadon pri la projekta instrukcio en la fabrikoj kaj aliaj entreprenoj. En diskutado, laboristoj de la fabrikoj kaj aliaj entreprenoj de Pogradeći-regiono disvolvis sian iniciatemon kaj elmetis 1,500 raciigajn proponojn. Dum sia diskutado pri la projekta instrukcio, la vastaj amasoj de agrikulturaj laboruloj aparte zorgis pri pliprodukto de greno kaj ekonomiaj plantoj. Ili decidis pli rapidiĝi disvolvoni de agri-

kultura produkto dum la periodo de la Kvina Kvinjara Plano.

SUKCESA FERMO DE LA KLUZPORDO DE LA AKVOKONDUKA TUNELO DE LA HIDROELEKTREJO MAŬ ZEDONG

En la arda revolucia tajdo levita okaze de la 30-a datreveno de la fondiĝo de la Albana Partio de Laboro kaj de la kunvoko de la Sesa Tutlanda Kongreso de la Partio, alvenis alia ĝojiga novaĵo de la konstruejo de la hidroelektrajo Maŭ Zedong ĉe Deje de Albanio: sukcesa fermo de la kluzpordo de la akvokonduka tunelo de la hidroelektrajo je la 16-a de aŭgusto. Tio estas alia grava venko akirita en la konstruado de la hidroelektrajo.

ANTAŬDATA FINKONSTRUO DE ŜOSEO AL FIERZE-HIDROELEKTREJO

17,000 laboruloj de Kruja, Mati, Kukesi, Shkodra, Lezha, Puke, Dibera kaj Tropoja en la norda Albanio komencis sturme konstrui la ŝoseon de



Popolanoj en montregiono de Albanio akiris grandan sukceson en konstruado de irigacia kanalo sur alta monto de suda Vlora.


Fierze je la 6-a de aŭgusto kaj triumfe finkonstruis ĝin je la 14-a antaŭ la difinita dato. Tio estas alia valora kontribuo de la laboristoj, kooperativanoj, intelektuloj kaj komandantoj kaj batalantoj de la Popola Armeo garnizonantaj en tiuj 8 regionoj por celebri la 30-an datrevenon de la fondiĝo de la Albana Partio de Laboro kaj la Sesa Kongreso de la Partio.

Dum la sturma konstruado, pli ol 600,000 kubmetroj da ŝtonoj estis formovitaj kaj pli ol 48 kilometroj da ŝoseo estis larĝigitaj.

La 14-an de aŭgusto, la volontuloj-partoprenantoj de tiu konstruado sendis telegramon al kamarado Enver Hoxha, la unua sekretario de la Centra Komitato de la Albana Partio de Laboro kaj kamarado Mehmet Shehu, prezidanto de la Konsilantaro de Ministroj, per kiu ili raportis pri la bonaj atingoj kaj gajno en ideologio dum la konstruado, garantiis, ke ili portos la altan revolucionan spiriton montritan en tiu laboro al la agrikulturaj kooperativoj, fabrikoj, aliaj entreprenoj, lernejoj kaj familioj, kaj esprimis sian decidemon ĉiam resti pretaj por iri al novaj lokoj, kie bezonas ilin la patrolando kaj la socialisma konstruado.



Laboristinoj de la Trika Fabriko de Korca aktive laboras.





Laboristoj de la Tiranea Fabriko de Elektropovaj Ekipaĵoj de Albanio muntas transformatorojn.

Teknikisto kaj junaj laboristoj de la Instrumenta Fabriko de Korca de Albanio kune studas produktan teknikon.



Rapide Falas la Hegemonio de la Usona Imperiismo en la Okcidenta Eŭropo

EN la pasintaj 20 jaroj, kaj precipe en la lastaj jaroj, ĉiam pli rapide falas la hegemonio de la usona imperiismo en la kapitalisma mondo. La rapida redukto de ĝiaj fortoj kaj la relativa grandiĝo de la fortoj de la landoj de la Okcidenta Eŭropo ankoraŭ pli elstarigis la kontraŭdiron.

Frue, en la komenco de la sesdekaj jaroj, Francio jam akre kritikis la kapitalisman monsystemon kun usona dolaro kiel ĝia spino kaj postulis restarigon de sistemo kun oro kiel la unika internacia rezervo kaj nuligon de la privilegio de la usona dolaro, kaj samtempe donis fortan frapon al la pozicio de la usona dolaro, interŝanĝante oron de Usono per granda kvanto da usonaj dolaroj.

En februaro de 1971, la ses landoj de la Komuna Merkato* decidis fondi Ekonomian kaj Monan Aliancon de Eŭropo kaj planis emisii unuecan monon de la Okcidenta Eŭropo en 1980 kaj unuigi paŝo post paŝo la ekonomian kaj financon politikon. Tiel, la hegemonio de la usona dolaro fariĝos ankoraŭ malpli tenebla.

Ĉiam pli akriĝas ankaŭ la kontraŭdiro inter landoj de la Okcidenta Eŭropo kaj Usono en komerco kaj dogana imposto. Tio estas montrita en la disputo inter la ses landoj de la Komuna Merkato kaj Usono. Depost sia fondiĝo en 1957, tiu ekonomia komunumo jam nuligis en si iom post iom la doganan imposton de industriaj kaj agrikulturaj produktaĵoj interne kaj starigis unuecan tarifan barieron** kontraŭ la ekstera mondo. En la lastaj jaroj, sufiĉe intensiĝis la komerca batalo inter Usono kaj la Komuna Merkato kaj precipe ilia batalo por merkato de fero, ŝtalo, petrolo kaj tritiko. Ambaŭ flankoj deziras invadi en la merkaton de sia rivalo kaj samtempe limigas la eniron de ties komercaĵoj en sian merkaton. Kaj krome, la landoj de la Komuna Merkato konkuras kun Usono pri merkato en la tuta mondo, sub la ŝildo de t.n. "helpoj". Oni raportis, ke de la jaro 1969 la Komuna Merkato jam liveris pli grandan sumon da "helpoj" al aliaj landoj de la mondo ol Usono,

kaj en julio de 1971 ĝi deklaris, ke ĝi donas favoron en dogana imposto al 91 landoj "en disvolviĝo", por plifortigi la komercan rilaton kun ili. Nun la interkonsento pri la aliĝo de Britio al la Komuna Merkato jam estas fundamente atingita kaj Danlando, Norvegio kaj Irlando petas aliĝon al ĝi. En 1973, la Komuna Merkato probable inkluzivos 10 landojn kaj kun pligrandigitaj ekonomiaj fortoj ĝi certe ankoraŭ pli intense konkurencos kun Usono en komerco.

La kontraŭdiro inter la landoj de la Okcidenta Eŭropo kaj la usona imperiismo ĉiam pli klare montriĝas ankaŭ en politiko kaj militaj aferoj. Unuigi kontraŭ la usona politiko de potenco kaj batali por sendependeco jam fariĝis grava enhavo de la diplomatio de multaj okcidenteŭropaj landoj. Dum sia oficperiodo, de Gualle, antaŭa prezidanto de Francio, persistis pri la politiko de sendependeco kaj pledis por ke la Okcidenta Eŭropo sin liberigu el la superregado de Usono kaj starigu "Eŭropon de la eŭropanoj" sendepende de la du superpotencoj. En decembro de 1969, la ŝtatestroj de la ses landoj de Komuna Merkato kunvenis kaj decidis rapidigi inter si la politikan unuiĝon kaj esprimis sian decidemon por "ebenigi la vojon por la unuiĝo de Eŭropo", kaj por ke Eŭropo "surŝultrigu sian devon en la morgaŭa mondo". En oktobro de 1970, la ministroj de eksteraj aferoj de la ses landoj publikigis raporton pri la "problemo de unuiĝo en politiko", kaj decidis okazigi du kunvenojn de la ministroj de eksteraj aferoj en ĉiu jaro kaj alpreni serion da aliaj aranĝoj "por ke frue alvenu la momento, kiam Eŭropo povos esprimi unuecan opinion". Aparte atentinde estas, ke ankaŭ Britio, kiu ĉiam emfazis sian "apartan interrilaton" kun Usono, alianciĝis kun la landoj de la Komuna Merkato. La kapitalismaj landoj de la Okcidenta Eŭropo regroupigas sin en la batalo kontraŭ la hegemonio de la usona imperiismo.

*La oficiala nomo de la Komuna Merkato estas *Eŭropa Ekonomia Komunumo*, kies ses membroj estas Francio, okcidenta Germanio, Italio, Neder-

lando, Belgio kaj Luksemburgo. Ĝi estis fondita en 1957 kun ĝenerala oficejo en Bruselo.

**Ekde la 1-a de januaro, 1959, la ses landoj de la Komuna Merkato iom post iom nuligis inter si la doganan imposton al industriaj produktaĵoj kaj je la 1-a de julio de 1968 dogana imposto de ĉiuj

industriaj produktaĵoj jam estis nuligitaj, tiu de agrikulturaj produktaĵoj estis poïome nuligita inter la 1-a de julio 1962 kaj la jaro 1969, kaj la varoj povas libere cirkuli. Kontraŭ la ekstera mondo, ili starigis tarifan barieron por bari la importadon de varoj de ekstere.



Investoj kaj Garnizonoj de la Usona Imperiismo en Okcidenta Eŭropo

POST la Dua Mondmilito, la usona imperiismo ĉie starigis militajn bazojn kaj faris ekonomian penetron, intencante altrudi sian hegemonion al la mondo.

Unu el la ĉefaj metodoj de ekonomia penetro de la usona imperiismo estas kapitala eksporto. En la komenca periodo post la Milito, la privataj rektaj investoj de Usono en aliaj landoj koncentriĝis en Latinameriko, kaj due en Kanado kaj Okcidenta Eŭropo. En la lastaj jaroj de la kvindekaj jaroj, iom post iom restariĝis la ekonomio de la landoj de Okcidenta Eŭropo, kaj ses el ili organizis Komunan Merkaton por kune opozicii la ekonomian ekspansion de la usona imperiismo. Sed por disvolvi sian ekonomion ili alprenis malferman politikon al importa kapitalo de Usono. La usona imperiismo do plenforte grandigis sian rektan investon al Okcidenta Eŭropo por rompi la tarifan barieron kaj akiri profitegon, kun la celo devigi tiujn landojn dependi de Usono en ekonomio.

Ĝis 1969, la usonaj privataj investoj en Okcidenta Eŭropo atingis 21.6 miliardojn da dolaroj, okupante la unuan lokon en la eksterlandaj investoj. En la ses landoj de la Komuna Merkato estis investitaj 10.2 miliardoj da dolaroj kaj en Anglio 7.2 miliardoj. La investoj en Kanado kaj Latinameriko reduktiĝis al la dua kaj tria lokoj. Tio signifas ke la investoj de la usona monopola kapitalo 12.7-obliĝis en la lastaj 20 jaroj, inter kiuj la investoj en la ses landoj de la Komuna Merkato 17-obliĝis kaj tiuj en Anglio 9-obliĝis.

En 1957, la profito akirita de la usonaj investoj en aliaj landoj estis 3.56 miliardoj da dolaroj, sed en 1969 tiu plimultiĝis ĝis 7.96 miliardoj, el kiuj 1.86 miliardoj da dolaroj estis akiritaj en Okcidenta Eŭropo, kiuj estis 3.2 obloj de la profito en 1957. Ĝuste konsiderante tiel gigantan profitegon, Nixon publike diris: Usono "ne povas seniĝi je Eŭropo".

Samtempe la usona imperiismo ankaŭ intensigis sian militan

regadon super Okcidenta Eŭropo. Ĝis la fino de 1970, Usono metis en Eŭropon 291,000 militistojn, kiuj okupis pli ol kvaronon de la usonaj militistoj garnizonantaj ekster la lando. Ili dislokiĝas jene:

en okcidenta Germanio	215,000
en Britio	20,000
en Hispanio	9,000
en Turkio	8,000
en Italio	10,000
en Grekio	3,000
en Belgio	1,000
la Sepa Floto	25,000
en okcidenta Berlino	1 infanteria brigado

Cetere, plejparto de la pli ol 2,000 grandaj kaj malgrandaj militaj bazoj starigitaj de Usono en pli ol 30 landoj kaj regionoj troviĝas en Okcidenta Eŭropo, el kiuj pli ol 200 estas en okcidenta Germanio.

Sed la ekonomia ekspansio kaj milita regado de la usona imperiismo vekis fortan opozicion de la landoj de Okcidenta Eŭropo, kaj tagon post tago disvolviĝas la tendenco de kuna opozicio de tiuj landoj kontraŭ la usona imperiismo.



JUNULOJ DE LA NORDO KAJ SUDO DE VJETNAMIO AKTIVE ALIĜIS AL LA ARMEO

Junuloj de norda Vjetnamio aktive aliĝis al la armeo kaj marŝis al la fronto por ekstermi usonajn agresantojn kaj savi la nacion.

De montregiono ĝis Vinh Linh sur la kontraŭusona fronto, de apudmaraj fiŝistaj vilaĝoj ĝis la nordokcidenta landlimo, la vastaj amasoj de junuloj levis ardan kampanjon de aliĝo al la armeo, firme tenante en sia memoro la instruon de Prezidanto Ho Chi

Minh "Tiel longe ĝis kiam unu sola agresanto restos sur nia tero, ni batalos plu por lin forpeli".

Kuraĝigate de la grandaj venkoj ĉe la Ŝoseo N-ro 9 kaj aliaj batalejoj, la vastaj amasoj de junuloj de suda Vjetnamio aktive aliĝis al la Liberiga Armeo aŭ gerilaj taĉmentoj. En la provincoj Ca Mau, Tra Vinh, Can Tho, Rach Gia k. a. de okcidenta parto de suda Vjetnamio, milo da junuloj aliĝis al la Popolaj Liberigaj Armitaj Fortoj.

La vjetnama popolo kaj la vastaj amasoj de junuloj aktive armeaniĝis kaj partoprenis en la milito, kun firma decido konduki la kontraŭuson nasisavan militon ĝis la fino.

32700 MALAMIKOJ EKSTERMITAJ DE LA LAOSAJ PATRIOTAJ ARMEO KAJ POPOLO

En la unuaj sep monatoj de la kuranta jaro, la laosaj patriotaj armeo kaj popolo ekstermis pli ol

Por konduki la kontraŭuson nasisavan militon, popolanoj de norda Vjetnamio ĝoje sendas siajn filojn aliĝi al la armeo.





Mozambikaj gerilanoj diligente sin ekzercas por kontraŭbatali la agresantojn.



Palestinaj gerilanoj sin trejnas por venki atakojn de uson-izraelaj agresantoj kaj jordanana reaktia armeo.

32,700 malamikojn, inter kiuj estis pli ol 250 usonaj soldatoj kaj konsilistoj, pli ol 15,600 saĝonaj pupaj armeanoj, pli ol 2,000 tajlandaj komplikaj armeanoj, pli ol 11,140 banditaj soldatoj de Vang Pao kaj 3,720 soldatoj de la dekstrularo de Vientiane. Ili faligis kaj detruis 657 usonajn banditajn aviadilojn kaj kaptis kaj detruis pli ol 770 militajn veturilojn, el kiuj duono estis tankoj kaj kirasaŭtoj, pli ol 10,900 diversajn armilojn inkluzive de 2,100 kanonoj, pli ol 400 diversajn radiotelegrafajn aparatojn kaj dekmil tunojn da militaj materialoj. Ili ruinigis centojn da municiejoj kaj tenejoj de militaj materialoj, forbruligis ĉ. 5,820,000 litrojn da benzino de la malamiko, dronigis kaj difektis dekojn da motorboatoj de ĝi kaj liberigis pli ol 20 milojn da polojanoj.

ARMITA RIBELO DE SOLDATOJ DE LA SUDKOREA PUPA ARMEO KONTRAŬ LA USONO-PAK-KLIKO

En la 23-a de aŭgusto soldatoj de la sudkorea pupa armeo en Inĉon-distrikto faris armitan ribelon por oponi kontraŭ la faŝisma regado de la Usono-Pak-kliko.

En tiu tago, la ribelantaj militistoj kaptis armilojn, faris batalon kontraŭ la pupa aera forto gardanta Silmi-insuleton kaj mortigis pli ol 20 malamikojn.

La ribelo tute estis kaŭzita de la freneza agresa politiko de la usonaj imperiistoj kaj la krimo de la pupa kliko de Pak Ĝen Hi en perfido al la patrio kaj la nacio.

Pli kaj pli forte ŝanceliĝas la regado de la usona imperiismo kaj ĝia lakeo Pak Ĝen Hi en suda Koreio.

LA MALAJA NACILIBERIGA ARMEO EMBUSKIS MALAMIKOJN

La 1-an de aŭgusto, la Malaja Naciliberiga Armeo embuskis malamikojn ĉe ŝoseo de la gubernio Padang Terap de Kedah-provinco. Je la 9-a horo de la 11-a antaŭtagmeze, kiam la malamikoj en kirasaŭto veturis en la embuskejon, ili trafis densan pafadon kaj 4 el ili mortis, 8 vundiĝis, inter kiuj 4 grave vundiĝis.

MOZAMBIKAJ ARMITAJ FORTOJ DETRUIS HELIKOPTERON DE PORTUGALA KOLONIISMA TRUPO

La 14-an de aprilo, mozambikaj patriotaj armitaj fortoj detruis helikopteron de portugala koloniisma trupo en Mueda de la provinco Cabo Delgado. La helikoptero estis trafita de minjetilo kiam ĝi estis surteriĝanta en transportado de portugalaj koloniismaj soldatoj. La helikoptero tute difektiĝis kaj ĉiuj en ĝi estis mortigitaj.

PALESTINAJ STURMANTOJ REPUŜIS IZRAELAN AGRESAN TRUPON

La 9-an de aŭgusto, izraela trupo ŝteliris en ĉirkaŭurbon de Habariya de la suda parto de Libano kun la intenco okupi la pozicion de la palestinaj sturmantoj en tiu loko. La palestinaj sturmantoj faris bravan reziston per mitraloj kaj minjetiloj kontraŭ la agresa trupo. Je la 10-a antaŭtagmeze la izraela agresa trupo estis repuŝita.



HUNGARA EKSPOZICIO EN PEKINO

LA Ekspozicio de Hungaraj Kuracaj Instrumentoj kaj Medikamentoj fermiĝis en Pekino je la 14-a de aŭgusto, 1971, post unusemajna funkciado.

La ekspozicion vizitis ĉinaj laboristoj, medicinaj kaj sciencesploraj laborantoj de koncernaj entreprenoj kaj institucioj.

Dum sia restado en Pekino, la hungara ekspozicia grupo vizitis koncernajn fabrikojn, hospitalojn kaj historiajn, vizitindajn lokojn.

NATURA GASO TROVITA EN ĜEGIANG-PROVINCO

De pli ol unu jaroj, en Ĝegiang-provinco vaste disvolviĝas aktivadoj por ekspluati naturan gason. Ĝis la fino de junio de la kuranta jaro, natura gaso estas trovita en 27 gubernioj kaj urboj kaj ĉirkaŭ 2,000 putoj estas boritaj. En tiuj lokoj, natura gaso jam estas vaste uzata en industrio, agrikulturo kaj popola vivo anstataŭ karbo.

Renovigu vian abonon jam nun al

El Popola Ĉinio

por ke vi daŭre ricevu ĝin en 1972 sen interrompo. Varbo de novaj abonantoj estas petata kun dankoj. Abonantoj en landoj, en kiuj ne estas nia peranto aŭ kiuj estas nepagipovaj, sin turnu rekte al ni.

Abontarifo				
Landoj		1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Britio	£	0.50	0.75	1.00
Kanado	dol.	2.00	3.00	4.00
Japanio	enoj	320.00	480.00	640.00
Aliaj landoj laŭ la tarifo por Britio.				
Aliaj aziaj kaj afrikaj landoj brita £		0.25	0.37	0.50
Latinamerikaj landoj kanada dol.		1.00	1.50	2.00

Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo, P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Sur la kovrilo:

Cervobreda knabino

Sur la dorskovrilo:

Cervoj de la Liaŭjuan-a Cervobredejo de Gilin-provinco

Korespondi Deziras

Prof-ino Zoica Florica (23-j.) Com. Virfurile, Jud. Arad, Rumanio, dez. interŝanĝi kolorajn bk kun tm.

Gyirkovits Vera, Hungario, Budapest XIII. Tomori koz 3.III.4.

Walter Ehrmantraut, d-6651 Bierbach/Saar, Hauptstrasse 43a, Germana Federacia Respubliko, kun geesp-istoj el la tuta mondo.

Fratoj Thomas Holtmann (10-j. kaj 7-j. respektive), 4041 Rosellerheide, Lindenstr. 34, Germana Federacia Respubliko, kun samaĝaj gejunuloj. Ankaŭ dankemaj por alsendo de fotoj kaj stampitaj pm.

Korekto

En la aldono de n-ro 9 *Celebre al la 50-a Datreveno de la Komunistarta Partio de Ĉinio*, pĝ. 1, dekstra kol., 1. 15, anstataŭ "kaj sekretaj policanoj" oni legu "kaj subfosoj".

EL POPOLA ĈINIO 人民中国报道

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO
P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro II (160) 1971

Ĉefa Enhavo

Venko Certe Apartenos al la Heroa Vjetnama Popolo	1
Prospera Brutobredado de Ĉinio	4
Notoj pri Kazaha Stepo	7
Iom-post-ioma Mekanikigo de Brutobredado	10
La Akvario de Kingdaŭ	13
Konstruado de Ŝoseoj en la Montregiono Juehi	15
Vang Hin-aj Reakiris Laborkapablon	19
Kuraco kaj Higieno en Montvilaĝo	21
Amasa Sporta Aktivado de Bejling-komunumo	25
Solvi Problemojn Dank' al Enketado	29
Feliĉaj Fratinoj	32
Ĉina Tablotenisa Teamo en Niĝerio	35
Albanio en Antaŭenmarŝo	39
Rapide Falas la Hegemonio de la Usona Imperiismo en la Okcidenta Eŭropo	42

Plenumi la Principon de Samtempa Disvolvo de Agri- kulturo, Forstumado, Brutobredado, Flankokupo kaj Fiŝado

Giagiaĝuang-brigado de Fenjang-gubernio, Ŝanhi-provinco pomue rikoltis meznombro 500 kg. da greno kaj 50 kg. da sensemigita koton.





Hjuĉang-regiono de Henan-provinco, fame konata pro produkto de tabako, refoje akiris riĉan rikolton de tabako.





Riĉan rikolton de fiŝo akiris
Ŝima-komunumo de Longhaj-
gubernio de Fugian-provinco.



Membroj de Gongpeng-komu-
numo de Juŝu-gubernio, Gi-
lin-provinco, ŝprucigas insek-
ticidon sur kampoj.



Membroj de Pujan-komunumo de Hiaŭŝan-gubernio,
Ĝegiang-provinco, zorge flegas jutajn plantojn.

Membroj de Baŭlige-
komunumo de Dong-
vu-flago (flago: admi-
nistra unuo egala al
gubernio) de Hilinguo-
le-ligo (administra unuo
egala al subprovinco)
de la Aŭtonoma Regio-
no de Interna Mongo-
lio tondas ŝafojn.



Ŝafaroj de Bajjinhile-
brigado de la Aŭtono-
ma Regiono de Interna
Mongolio





La komunumanoj de Ventang-brigado de Dongguan-gubernio, Guangdong-provinco, energie disvolvas bredadon de porkoj.

Hijingzi-brigado de Liangceng-gubernio de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio persistis en forstumado kaj rapidigis la disvolviĝon de agrikulturo kaj brutobredado.

Parto de la forstuma regiono de Jiĉun de Hejlonggiang-provinco.





